

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

POR SAVO
DE LA HOMARO

BULGARIO
KAJ UN

UNUA ILEF —
FESTIVALO

ESPERANTO
KAJ UNESKO

KOOPERATIVA
E-RENKONTIGO

LINGVAJ
DEMANDOJ

100-JAROJN
ESPERANTO

NI RECENZAS

POEZIA
PAGO



HISTORIAJ DECIDOJ POR SAVO DE LA HOMARO

En sia konferenco, okazinta la 22-an — 23-an de oktobro 1985 en Sofio, la Politika Konsultiĝa Komitato de la ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto faris historiajn decidojn, kiuj montras la solan vojon por savo de la homaro kontraŭ la minaco de nuklea katastrofo. En la Deklaracio de la sep alianci-taj socialismaj landoj dominas unu multsignifa vorto: frostigo! Frostigo de la jam ekzistantaj nukleaj armiloj, de la lokado de novaj ekstermaj nukleaj armiloj sur la tero kaj en la Kosmo; frostigo de la militbuĝetoj, de la produktado kaj elprovado de novaj — nukleaj kaj ordinaraj, armiloj por amasa neniigo.

Neniam ĝis nun al la mondo estis proponita tiom klara kaj tiom komprenebla por ĉiu loĝanto de nia planedo programo por savo de la nuklea hororo. En momento de furioza politika demagogio flanke de niaj ideologiaj kontraŭuloj, kiuj plenigas la ĉielvaston per krioj pri homaj rajtoj kaj samtempe estas pretaj neniigi almenaŭ du trionojn de la homaro, la akceptita en Sofio Deklaracio estas voĉo de humanismo, de sincera maltrankvilo pri la sorto de nia planedo. Nur komunaj iniciatoj de la du plej potencaj ŝtatoj — Sovetunio kaj Usono, nur komunaj agoj, realigotaj rezulte de seriozaj kaj sinceraj intertraktadoj je diversaj registaraj niveloj, surbaze de la principoj de reciproka egaleco kaj sekureco, povus garantii daŭran pacon kaj interpopolan kunlaboradon. La ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto ne strebas al milita supereco, tamen ili neniam kaj neniel permesos militsuperecon de la imperiismaj militemuloj. Grava kondiĉo por reciproka interkompreniĝo estas la konservo de la postmilitaj landlimoj en Eŭropo. Ĉiu provo pri rompo de la nunaj landlimoj subfosus la fundamentojn de la ekzistanta ordo sur nia kontinento kaj minacus la mondan pacon.

La konferenco de la Politika Konsultiĝa Komitato de la ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto okazis en la antaŭtagoj de la gravega renkontiĝo je plej alta nivelo inter la ĝenerala sekretario de KPSU Mihail Gorbaĉov kaj la prezidento de Usono Ronald Reagan. La unua gvidanto de KPSU kaj de la sovetia ŝtato alvenos en Genevon kiel heroldo de la porpacaj esperoj kaj streboj de ĉiuj honestaj ordinaraj homoj en la mondo; li renkontiĝos kun la

usona ŝtatestro apogante sin sur paca dokumento, kian la mondo ĝis nun ne konas — la akceptita en Sofio Deklaracio, kiu entenas radikalaĵajn kaj plej efikajn proponojn kaj rimedojn por prevento de la militminaco kaj por paca evoluo de la homaro.

La ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto proponas al Sovetunio kaj al Usono:

- ĉesigi ĉiujn laborojn por konstruado, elprovo kaj lokado de kontraŭsatelitaj kosmaj armiloj;

- frostigi la jam ekzistantajn nukleajn armilojn je la nuna kvantnivelo kaj maksimume limigi ilian modernigon kaj samtempe ĉesigi la produktadon, elprovadon kaj lokadon de novaj specoj kaj tipoj de similaj armiloj;

- reciproke sin devontigi ne lokadi kian ajn nuklean armilon sur la teritorion de ŝtatoj, en kiuj ankoraŭ ne estas tiaj armiloj, kaj ne plimultigi la rezervojn de nukleaj armiloj, ne anstataŭigi ilin per novaj tipoj en la landoj, kie ili jam estas lokitaj;

- reciproke sin devontigi ne konstrui kaj ne produkti novajn tipojn de ordinaraj armiloj, kiuj laŭ sia detrua potenco estas egalaj al tiuj por amasa ekstermo;

- frostigi la nombron de sia militistaro inkluzive tiun ekster la landlimoj de iliaj naciaj teritorioj je la nivelo de la 1-a de januaro 1986;

- reciproke sin devontigi ne pliigi siajn militbuĝetojn ekde la sekva financa jaro.

La alvoko por defendo de la paco estas plej grava imperativo de nia nuntempo kaj estas evidente, ke la Sofia Deklaracio proponas al la homaro plej konkretan kaj plej efikan programon por tuja ĉesigo de la vetarmado.

Memorindaj estas la vortoj de la unua partia kaj ŝtata gvidanto de Popola Respubliko Bulgario Todor Jivkov:

„Paco aŭ milito — ne estas tria solvo. La interesoj de la tuta homaro (sendepende de rasoj kaj nacioj, de religiaj kaj ideologiaj konceptoj, postulas de ni ĉiuj uuuigi kaj kunagidi sub la standardo de la paco“.

La popoloj kun espero atendas de la ŝtatestroj de la grandaj potencoj urĝajn decidojn pri konservo de la paco kaj de la homa vivo!



LAŬPLANA SEMADO — RIĈA RIKOLTO

ĤRISTO GOROV,
prezidanto de BEA

En la fino de la kuranta jaro oni konstatas, ke la rikolto estis bona, eĉ riĉa — precipe ĝe internaciaj kaj enlandaj aranĝoj. Ni do menciuj la pli signifajn. Atentinda estas la 18-a Konsultigo de E-Asocioj el la Socialismaj Landoj — ĝin partoprenis delegitaroj el Soveta Unio, Bulgario, GDR, CSSR, Hungario, Kubo, Pollando, Vjetnamio kaj Rumanio (observanto). La partoprenintoj substrekis la respondecon de siaj asocioj en la tutmonda agado kaj batalo por konservado de la paco, por malarmado kaj kontraŭ la „stelaj militoj“. La Konsultigo omaĝis al la 40-a datreveno de la venko super faŝismo, kaj salutis la unuflankan paŝon de Soveta Unio por ĉesigo de la lokado de novaj raketoj, atendante adekvatajn agojn fare de Usono. La delegitaroj interŝanĝis sperton pri la agado de siaj asocioj en la amasaj organizaĵoj, difinis taskojn por kunlaboro inter si; substrekis la gravecon de faka aplikado de Esperanto kaj interkonsentis pri aktivecoj lige kun la 100-jara jubileo de la Internacia Lingvo.

Streĉa estis la laboro de centoj da aktivuloj por brila okazigo de la 41-a kongreso de BEA. En ĉesto de gastoj el multaj landoj la estraro raportis pri la rezultoj de la pasinta kvinjara periodo, pri kulturkleriga, porpaca kaj propaganda agado, pri plia kresko de la membraro precipe per gejunuloj. Ankaŭ la statuto estis modifita en ligo kun la ekonomiaj taskoj, kiujn prenis sur sin nia asocio.

Tuj post la kongreso intense ekfunkciis la Internacia Esperanto-Kurŝejo en Pisanica: 20-taga kurso por funkciuloj de landaj asocioj sub la gvido de Tibor Vasko; du seminarioj por kursgvidantoj kun partopreno de kelkdekoj da geinstruistoj; internacia festivalo de kino-foto-amatoroj.

Rimarkinda aranĝo estis la seminario, organizita de BEA kaj Monda Turismo lige kun la Generala Asembleo de la Monda Turisma Organizaĵo. Impona estis la partopreno: la prezi-

danto de UEA s-ro G. Maertens, delegitoj el Italio, Hispanio, Pollando, Bulgario, Belgio, Jugoslavio, Soveta Unio, Rumanio, Pola Radio ktp.

En la pitoreska urbo Veliko Târnovo okazis la Tria Internacia Somera Universitato kun lektoroj el kelkaj landoj.

En Sofio dum julio kunvenis infanoj el kelkaj landoj kaj partoprenis la Internacian Infanan Asembleon „Standardo de la Paco“. Diference de la ceteraj infanoj el naŭdek landoj, tiuj infanoj parolis kaj kantis en Esperanto, kio ege impresis la ĉeestantojn.

Grava internacia aranĝo estis la Kooperativa Konferenco, organizita de Centra Kooperativa Unuiĝo kaj de DE de BEA en Plovdiv. Dum du tagoj delegitoj el Bulgario, USSR, Hungario, CSSR, Pollando, Anglio kaj Rumanio diskutis pri kooperativaj problemoj.

Kelkdekoj da bulgaroj partoprenis la 70-an universalan kongreson kaj la kongreson de TEJO. En Aŭgsburgo distingiĝis nialandaj artistoj, kiuj prezentis du teatraĵojn, nome „La aŭgsburga kretocirklo“ kaj „Tri viroj en la nego“. En la Muzika Vespero kaj la Internacia Arta Vespero elpaŝis Veselin Damjanov, Galja Kostova-Toteva, Maria Angelova, Jana Cikalova, Angelina Sotirova kaj Karamfilka Adamova. Dimităr Terziev denove gvidis la internacian ĥoron, kiu partoprenis la solenaĵon de la dumiljara urbo Aŭgsburgokajtiun ĉe fermo de la kongreso.

Post bona rikolto venas laŭplana semado por la jaro 1986.

La centjara jubileo proksimiĝas kaj oni planas kelkajn aranĝojn, interalie kunvokon de balkanlanda konferenco en la subbulgara urbo Plovdiv kaj eldonon de antologio kun verkoj de konataj aŭtoroj el balkanaj landoj.

Dediĉe al la jubileo kaj al la 13-a kongreso de BKP oni preparas en urbo Razgrad festivalon de amatora arto.

En urbo Vraca sekvos recitaloj kaj seminarioj dediĉe al la 110-a datreveno de pereado de la granda

bulgara poeto Ĥristo Botev kaj scienca konferenco dediĉita al Ĵurij Gagarin. En la sama urbo okazos internacia scienc-praktika konferenco pri la rolo de esperantaj gazetoj kaj radiorelektoj. Ĉeestos redaktoroj el multaj landoj.

Specialajn zorgojn oni postulas de ĉiuj sociaj estraroj por plialtigo de la socia agadkapablo kaj konkreta helpo de distrikta estraro al la novaj societoj kaj kluboj.

Ankaŭ la sekcioj havos seriozajn taskojn venontjare: regula eldonado de la bultenoj, organizo de konferencoj kaj kunvenoj, kontaktado kun profesiaj, junularaj, kooperativaj, sciencaj, kulturaj kaj aliaj amasorganizaĵoj kaj sugesto al ili apliki Esperanton en siaj internaciaj rilatoj. Kiel konstatite dum la kongreso, la plikresko de la asocia membraro venas el la junularaj rondoj. Jen vasta kampo por la sekcioj junulara kaj instruista.

En ligo kun la 100-jara jubileo estas planite eldoni vortarojn, lernolibrojn, versaĵojn kaj novelojn de konataj aŭtoroj, propagandajn broŝurojn kaj periodaĵon en bulgara lingvo por regule informi la gazetaron pri eventoj en nia Esperanto-mondo — enlanda kaj eksterlanda.

La 41-a kongreso aprobis specialan rezolucion por pliaktiviĝo de la pacmovado esperanta en nia lando. BEA daŭre donos sian moralan kaj materialan helpon al MEM-iniciatoj. Kune kun la pacama homaro ni esperantistoj devas esti senlaca batalantoj kontraŭ nova nuklea milito, en kiu forbrulus ĉiuj idealoj, planoj kaj revoj pri harmonio interpopola.

La 41-a kongreso metis bonan fundamenton por estonta agado. Nun de ni ĉiuj dependas kreskigi riĉan rikolton.

Do al laboro, gekamaradoj!



BULGARIO KAJ UN

Jam tri jardekojn Bulgario estas aktiva membro de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Ĝi estis unuanime elektita kiel membro de tiu organizaĵo la 14-an de decembro 1955 en la Deka Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN.

La principoj kaj la celoj de UN, proklamitaj en ĝia Statuto, plene respondas al la deziro de la bulgara popolo vivi en paco, amikeco kaj kunlaborado kun ĉiuj ceteraj popoloj.

PR Bulgario aktive partoprenas la kompletan diversflankan agadon de UN, sed en la centro de ĝia atento ĉiam estas la problemoj pri stabiligo de la paco kaj sekureco en la mondo. Kiel membro de la Komitato (pli poste — Konferenco) pri Malarmado, tuj depost ĝia fondo en 1962, Bulgario aktive partoprenas en la intertraktadoj pri malarmado en Genevo. Ĝiaj delegitaroj en la Konferenco kontribuis por ellaboro, sub la egido de UN, de gravaj interkonsentoj, kiel la Kontrakto pri malpermeso de la eksperimentoj kun nukleaj armiloj en la atmosfero, kosma spaco kaj sub la akvo kaj de la Kontrakto pri ne-disvastigo de la nukleaj armiloj.

En la kadroj de pridiskutado de la ĉiam aktuala problemo pri sennukleaj zonoj, Bulgario ludis gravan rolon, por ke la landoj-membroj de UN subtenu la ideon pri transformo de la Balkanoj en zonan liberan de nuklea armilaro. Kiel aktiva membro de la Komitato de UN

pri Dekoloniado, Bulgario havas sian specifan kontribuon ankaŭ al tiu agado de UN, dank' al kio ĝi gajnis grandan aŭtoritaton antaŭ la popoloj batalantaj kontraŭ koloniismo kaj rasismo. Depost 1979 Bulgario partoprenas la laboron de la Konsilio de UN pri Namibio. En aprilo ĉi-jara en nia lando estis organizita Internacia Seminario de UN pri la problemoj de Namibio.

Nun Bulgario estas membro de la Komisiono pri Homaj Rajtoj, bulgaraj ekspertoj partoprenas la laboron de la Komitato pri Rasa Diskriminacio. Ĝi estis la unua lando — membro de UN, kiu ratifikis la Konvencion pri likvido de ĉiuj formoj de rasa diskriminacio. En tiu sfero nia lando opinias sian unuan devon la likvidon de la hontinda sistemo de apartismo.

En la 14-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1959 Bulgario estis elektita kiel membro de la Komitato pri Utiligo de la Kosma Spaco por Pacaj Celoj. Nun la ĉefa tasko de niaj reprezentantoj en tiu komitato estas malpermeso de militarismo de la Kosmo, kio estas ĉefa kondiĉo por paca ekposedo de la kosma spaco, en intereso de la tuta homaro.

La konsekvenca ekstera politiko de Bulgario, baziĝanta sur la principoj de paca kunezistado kaj direktita al solvado de ĉiuj komplikaj internaciaj problemoj pere de konstruktivaj intertraktadoj, estas alte taksata fare de la internacia demokratia publiko.

Altan pritakson de la rolo de Bulgario en la kompleta agado de UN faris dum sia vizito en nia lando en 1984 la Ĝenerala Sekretario de UN Xavier Perez de Cuelār, kiu havis interparolojn kun la bulgara ministro de

eksteraj aferoj Petâr Mladenov kaj mem kun la prezidanto de la Stata Soveto de PR Bulgario Todor Jivkov.

Nova grava rekono de la meritoj de nia lando al la agado de UN estas ĝia elekto kiel membro de la Konsilio pri Sekureco por la periodo 1986—1987, dum la 40-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo (Novjorko, oktobro 1985).

Dank' al tiuj altaj pritaksoj de ĝia kontribuo al la pacaj celoj de UN, nia lando ne unufoje estis dommastro de diversaj aranĝoj de UN. Nur dum la kuranta jaro (laŭ rekomendo de la Dua Monda Konferenco pri Utiligo de la Kosmo por Pacaj Celoj) en Bulgario okazis Seminario por Distanca Sondado de la Tero pere de Satelitoj, kaj la XXIII Sesio de la Specialigita Organizaĵo de UN pri edukado, scienco kaj kulturo (UNESCO).

La bulgaraj esperantistoj ankaŭ havas sian gravan kontribuon al la porpacaj celoj de la Unuiĝintaj Nacioj — ili kolektis pli ol 100 000 subskribojn sub la alvoko de la Kvakera Esperanto-Societo en Londono subtene al la decidoj de la Unua Speciala Sescio de UN pri Malmarmado. Dum la Dua Speciala Sescio pri Malmarmado (Novjorko, julio 1982), la prezidanto de la Bulgara Societo pri UN Krum Hristov, dum solena ceremonio okazinta la 1-an de julio 1982, en ĉeesto de la reprezentanto de UEA ĉe UN prof. Humphrey Tonkin, prezentis la subskribojn al la vic-ĝenerala sekretario de UN kaj direktoro de la Centro de UN pri Malmarmado s-ro Jan Martenson.

Tio estis grava rekono de la nobla porpaca agado de la bulgaraj esperantistoj, de ilia deziro vivi en paca mondo.

LA INTERNACIA LINGVO KAJ UNUIĜINTAJ NACIOJ

Prof. HUMPHREY TONKIN,
Vicprezidanto de UEA

Por festi la 40-jaran datrevenon de Unuiĝintaj Nacioj, ni publikigas resumon de parolado, kiun d-ro Humphrey Tonkin prezentis i. a. la 20-an de septembro antaŭ Esperanto-Societo de Novjorko.

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj direktas siajn aferojn en ses lingvoj. Antaŭ 40 jaroj, kiam UN estis fondita, estis nur du laborlingvoj (kvankam tri aliaj estis „oficialaj“ lingvoj). La Eŭropa Komunumaro havas eĉ ankoraŭ pli komplikajn lingvan situacion, kun sep lingvoj nun uzataj kaj pliaj lingvoj aldonotoj.

En tempo kiam la angla lingvo estas vaste uzata por internacia komunikado, ĉi tiu lingva diverseco eble ŝajnas surpriza. Ĝi estas rezulto ne tiel multe de la bezono komuniki kiel de la bezono por egaleco. Se la tuta komunikado okazus en la angla, la angleparolantaj landoj ĝuus netolereblan avantaĝon en internaciaj organizoj kiel Unuiĝintaj Nacioj aŭ Eŭropa Komunumaro (EK). Sekve, ĉi tiuj organizoj elektis uzi multajn lingvojn. Sajnas, ke ili estas devigataj elekti: inter neegaleco en unu lingvo aŭ egaleco kun multaj lingvoj.

La lingva diverseco necesigas komplikajn tradukajn kaj interpretajn servojn. Tiel multe kiel 40 procentoj de la administra buĝeto de EK estas uzata por lingvaj servoj, kaj ĉe UN tiom kiel 15 procentoj de la *totala* buĝeto estas uzata por similaj celoj. Kaj ĉiun fojon, kiam plia lingvo estas aldonita, la kostoj altiĝas geometrie.

Bedaŭrinde, eĉ ellaboritaj lingvaj servoj,

kvankam eble bonegaj, ne donas plenan egalecon. Multe de la laboro de EK devas okazi en neformalaj kunsidoj sen interpretistoj, kaj multnombrajn neoficialajn aŭ duon-oficialajn dokumentojn oni ne tradukas en ĉiun laborlingvon. Ĉe UN aldoniĝas la kroma malavantaĝo, ke ne ĉiuj el la lingvoj de ŝtatoj-membroj estas fakte uzataj. Nacioj kiel Usono, Sovet-Unio, Hispanio aŭ Francio povas uzi sian propran lingvon, sed nacioj kiel Japanio aŭ Brazilo ne povas.

Cu la elekto neeviteble estas inter la uzo de unu sola lingvo unuflanke kaj egaleco aliflanke? Subtenantoj de Esperanto opinias, ke estas eble havi ambaŭ.

La historio de Esperanto en internaciaj organizoj estas fascina. Proponita kiel la lingvo de Ligo de Nacioj en 1920, ĝi preskaŭ gajnis akcepton. Kun la Esperanto-movado en malordo en 1945 Esperanto ne gajnis seriozan atenton de UN, kiam tiu organizo estis fondita. Pli postaj proponoj pri ĝia alprenado estis aŭ flankenigitaj (kiel okazis en la fruaj 50-aj jaroj) aŭ simple ignoritaj (kiel en 1966), ĉefe ĉar ili minacis la pozicion de la ekzistantaj laborlingvoj.

Tamen, dum oficiala subteno flanke de UN ankoraŭ mankas, Esperanto faris rimarkindan progreson dum la pasintaj 40 jaroj. Ĝi gajnis ankaŭ iom da oficiala rekono. En 1954 rezolucio de UNESKO rekonis la atingojn de la lingvo alproksimigi la popolojn de la mondo, kaj Universala Esperanto-Asocio ĝuas oficialajn konsultajn rilatojn kun UNESKO. Ĝi havas si-

milajn ligojn kun Organizo de Amerikaj Statoj, kaj ĝi estas „sur la deŝortabelo“ de organizoj, ligitaj kun Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN. Pluraj oficialaj UN-dokumentoj jam aperis en Esperanto.

De post 1979 Universala Esperanto-Asocio havas sian propran oficejon ĉe UN. La celo de tiu oficejo estas helpi Unuiĝintajn Naciojn kompreni la karakteron de sia lingva problemoj kaj la solvon, kiun Esperanto prezentas.

La novjorka oficejo de UEA respondacas pri multnombraj taskoj, inkluzive de la produktado de informilo, la organizado de jara konferenco kaj reprezentado de UEA en agadoj de UN. Ĝi estas ankaŭ la ĉefa rekomendanto de Esperanto ĉe UN. La laboro de la oficejo, fakte la tuta direkto de la laboro de UEA ĉe UN, prenas sian inspiron el la tiel nomata Plano Harry (laŭ la nomo de la iama Ambasadoro de Aŭstralio ĉe UN Ralph Harry, esperantisto). La plano Harry proponas laŭgradan enkondukon de Esperanto ĉe UN dum konsiderinda periodo. Unue, oni uzus Esperanton kiel traduklingvon por certaj specoj de materialo, paralele kun la aliaj lingvoj. Dume, kursoj kaj aliaj programoj por helpi homojn lerni la lingvon estus komencitaj, kaj oni instigus la stabon partopreni ilin, samkiel oni faras por la aliaj laborlingvoj de la organizo.

Due, Esperanto fariĝus la sola lingvo de registrado por certaj dokumentoj, kiuj ne estus tradukitaj en aliajn lingvojn. Iom post iom tiu arango ĝeneraligus, ĝis ĝi kovrus la plimulton de la dokumentoj. Dume, la mono ŝparita je tradukado estus investita en la interpretaj servoj, kun la celo fortigi tiujn servojn kaj komenci enkonduki aldonajn lingvojn en certaj cirkonstancoj. Esperanto estus enkondukita ankaŭ kiel lingvo de interpretado por certaj specoj de kunvenoj. Etapon post etapo, dum homoj alkiutimiĝus al Esperanto, la lingvo iĝus la ĉefa lingvo de la interpretado. Anstataŭ interpreti ĉiun paroladon kaj ĉiun intervenon en kvin aliajn lingvojn, interpretistoj laborus el multaj lingvoj, sed interpretus nur en Esperanton. Rezulte, pli da personoj povus uzi sian gepatran lingvon en debatoj, pli da egaleco estus atingita kaj ĉiuj diskutoj estus interpretitaj en Esperanton.

Aparte interesa aspekto de la Plano Harry estas la fakto, ke ĝi ne proponas forigi la uzon de naciaj lingvoj el UN, sed fakte pligrandigas ilian nombron. Sekve ĝi estas nenia granda minaco al iu ajn, kaj ĝia alprenado okazus simple per laŭgrada akcepto. Estas bona ŝanco, kompreneble, ke teknologio ludos rolon en tiu procedo. Esperanto jam komencas interesi tiujn, kiuj laboras pri kompute helpata tradukado. Eble venos la tago, kiam Esperanto formos la centran ŝaltmekanismon kaj por aŭtomataj kaj por homaj sistemoj de lingva komunikado ĉe UN, en EK kaj aliloke. Komunikado fariĝos pli efika kaj pli egalrajta, se tian celon oni atingos.

(El „*Esperanto*“, n-ro 10, oktobro 1985)

„LA UNUIGO KREAS LA FORTON“

La 19-an de septembro j. k. en Plovdiv estis solene inaŭgurita impona monumento de la Unuiĝo. Post 100 jaroj la urbo denove travivis la emocion kaj la rememoron pri unu el la plej signifaj eventoj en la historio de Bulgario.

La esperantistoj el societo „Kulturo“ ne staris flanke de tiu tuturba celebrazo. Kune kun popola legejo „Ivan Vazov“ kaj la organizaĵo de Patrolanda Fronto en kvartalo „Liljana Dimitrova“ la societa estraro organizis la 20-an de septembro solenan kunvenon. Estis prezentita recitalo „Sen unuiĝo ne estas saviĝo“ fare de la aktorino Veselina Kurteva, merita aktoro Ivan Josifov kaj recitgrupo ĉe societo „Kulturo“ (Zdravka Bogdanova, Ginka Torĉeva, Lilija Karakaĉanska). Pri la unuiĝo parolis E. Emanuilova, historiistino ĉe la Muzeo de Naciliberiga Movado. La esperantisto doc. d-ro Petăr Silev, nepo de la membro de revolucia komitato en Goljamo Konare — la instruisto Petăr Silev kaj kuzo de la standardistino Nedjalka Sileva, rakontis rememorojn pri sia avo.

V. K.

IMPONA CELEBRADO

La 25-an de oktobro 1985 en la granda halo de „Domo de Tekniko“ en Sofio oni celebris la 80-jaran jubileon de la granda bulgara sciencisto-geodeziisto kaj elstara bulgara esperantisto Vasil Peevski, ĉefredaktoro de la Esperanto-versio de revuo „Scienca Mondo“ — organo de Internacia Asocio de Sciencistoj.

Ceestis multaj eminentuloj — rektoroj de superaj institutoj, dekanoj de fakultatoj, vicministroj, ĉefoj aŭ membroj de la estraroj de pluraj asocioj — arkitektoj, geodeziistoj, esperantistoj, akademianoj, profesoroj, docentoj, inĝenieroj k.t.p. Ceestis ankaŭ reprezentantoj de sciencaj medioj el Svislando, Pollando, GDR.


La jubileulo akceptis pli ol 40 salutadresojn. Krome, estis anoncitaj pli ol 80 saluttelegramoj kaj leteroj de institucioj kaj altranguloj el Bulgario, kaj pli ol 100 — de institucioj kaj altranguloj el aliaj landoj.

Apartan mencion indas la salutletero al la jubileulo de k-do Todor Jivkov — prezidanto de la Stata Soveto de PR Bulgario, kaj la dokumento, per kiu Vasil Peevski estis distingita per la titolo „Heroo de socialisma laboro“. Pluraj institucioj distingis lin ankaŭ per siaj insignoj kaj medaloj.

Imponan salutparolon faris profesoro d-ro Stojan Guĝev — vicprezidanto de la Esperanto-Akademio, kiu emfazis, ke sian soci-utilan agadon la jubileulo komencis kiel estrarano de ĝelernanta esperantista klubo.

Estis vere kortuŝa celebrado de granda homo.

Petko ARNAUDOV



Tibor Sekelj pri Esperanto en la XXIII Sesio de UNESCO

Estimata s-ro Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco, Estimataj gesinjoroj,

Mi volas esprimi mian esperon, ke multaj gravaj atingoj de UNESCO dum ĝia kvardekjara agado kontribuos por ĝia sukcesa evoluo, kaj la Organizaĵo plu ĝuos la konfidon de la popoloj en pli bona estonto kaj per nova impeto daŭrigos trakti tikk-lajn solvendajn problemojn en la sfero de edukado, scienco, kulturo kaj komunikado. Mi kredigas vin, s-ro Prezidanto, ke nia organizaĵo — Universala Esperanto-Asocio, ne ŝparos fortojn por plu doni sian kontribuon, kvankam modestan, laŭ siaj ebloj, por la prospero de UNESCO kaj por realigo de ĝiaj noblaj celoj. Ni alte estimas kaj apogas ĝian gravan rolon por evoluo de la mondo.

Universala Esperanto-Asocio estas en konsultaj rilatoj kun UNESCO ekde 1954. Dum tiuj tridek jaroj ni havis la eblecon multfoje kaj diversmaniere kunlabori kun tiu organizaĵo. La pli ol cent periodaĵoj, eldonataj en la internacia lingvo Esperanto kaj la 15 radio-stacioj elsendantaj en Esperanto kaj havigantaj informojn al 8—10 milionoj da E-parolantoj en la tuta mondo, sisteme observas ĉiujn gravajn projektojn de UNESCO, kaj multaj bazaj dokumentoj de tiu organizaĵo estis publikigitaj kaj disvastigitaj inter E-parolantoj. Iuj el la ĉefaj projektoj de UNESCO estis akceptitaj fare de Universala Esperanto-Asocio kiel bazo de ampleksa kunlaborado. Kiam la grava projekto pri reciproka estimo kaj interkonatigo de Okcidentaj kaj Orientaj kulturoj estis lanĉita fare de UNESCO, ĝi estis favore adoptita de Universala Esperanto-Asocio, kiu publikigis tradukitajn en Esperan-

ton ĉefverkojn de aŭtoroj el la kvin kontinentoj. La jaro de handikapuloj estis vaste diskonigita kaj estis fondita speciala Internacia Organizaĵo de Handikapuloj-Esperantistoj kun propra periodaĵo. Samtiel la Internacia Jaro de Junularo kaj la Virina Jardeko de la Unuiĝintaj Nacioj estis lanĉitaj kune kun UNESCO. Tiuj estas nur kelkaj ekzemploj menciindaj. Ĉio ĉi estas nur la rekta kaj videbla kontribuo al la celoj kaj projektoj de UNESCO, sed niaj nerektaj kontribuoj estas ankoraŭ pli grandaj. Ĉar, citante la vortojn de la Ĝenerala Direktoro s-ro Amadou Mahtar M'Bow, „Esperanto estas ne nur lingvo: ĝi estas humanisma movado, kies strebo estas paca interkompreniĝo inter la popoloj kaj la kulturoj“.

S-ro Prezidanto, Esperanto celebros la centjarigon de sia ekzistado en 1987. En pli ol cent landoj estas organizaĵoj kaj unuopaj personoj, kiuj simpatias kaj subtenas ĝiajn idealojn, efektivas viglan kulturan interŝanĝon, forigante naciajn kaj rasajn barojn, surbaze de mondskala toleremo, kunlaborado kaj frateco. Ĉirkaŭ 200 internaciaj renkontiĝoj estas okazigataj ĉiujare, en kiuj Esperanto estas la sola laborlingvo. Ilia amplekso estas tre larĝa, diverskaraktera: sciencaj simpozioj de komputistoj, cibernetikistoj kaj medicinistoj, konferencoj de verkistoj, aktoroj kaj instruistoj, junularaj kaj infanaj renkontiĝoj, festivaloj de teatraĵoj, de pupprezentaĵoj kaj de poezio, renkontiĝoj de naturamikoj, vegetaranoj, de familioj, en kiuj Esperanto estas parolata kiel natura familia lingvo. La kulmino estas la ĉiujaraj universalsaj Esperanto-kongresoj (kun 2 ĝis 5 mil partoprenantoj),

Grava rekonio pri la granda kontribuo de Popola Respubliko Bulgario por konservo kaj prezento al la monda publiko de monumentoj kaj verkoj de la multjarcenta homa kultura agado kaj pri la atingoj de la bulgara popolo en la sfero de scienco, kulturo kaj arto estis la okazinta en Sofio de la 8-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro 1985 XXIII Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESCO — organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj pri edukado, scienco kaj kulturo. En la laboro de tiu grava organizaĵo partoprenis reprezentantoj de plej altaj ŝtataj kulturaj institucioj el 160 landoj.

Kiel en la plenkunsidoj de la Ĝenerala Konferenco, tiel en la apartaj komisionoj la partoprenantoj pridiskutis multajn gravajn problemojn, ekz.: „Pri la kondiĉoj de membreco en UNESCO“, „Scienco, tekniko kaj socio“, „Protektado de la naturmedio, teraj kaj maraj fontoj“, „Komunikado serve al la homaro“, „Likvido de superstiĉoj, maltoleremo, rasismo kaj nacia diskriminacio“, „Kulturo kaj estonteco“, k. a.

En la XXIII Sesio de tiu plej alta internacia forumo pri kulturo, edukado kaj scienco por unua fojo post 1954 denove estis starigita la problemoj pri la internacia lingvo Esperanto.

En intervjuo antaŭ la Bulgara Televido la Ĝenerala Direktoro de UNESCO s-ro AMADOU MAHTAR M'BOW, respondante al starigita demando pri Esperanto, esprimis sian favoran rilaton al la Internacia Lingvo kaj al la nobla, althumana agado de la internacia Esperanto-movado, al ĝia porpaca idealoj pri interpopola kompreniĝo.

En la plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco s-ro TIBOR SEKELJ, komitatano de Universala Esperanto-Asocio, parolis favore al Esperanto. Ĉi-sube ni publikigas tradukon el angla lingvo de lia parolado.



Sofia 1985

okazantaj en diversaj regionoj de la mondo — pasintjare en Vankuvero (Kanado) ĉijare en Aŭgsburgo (FRG) kaj venontjare en Pekino (Ĉina Popola Respubliko). Tiu translima kultura interŝanĝo de sperto, amikeco kaj reciproka interkompreniĝo praktike estas vera apogo al la ĉefaj celoj de UNESCO, kiu ne diferencas de iuj projektoj, subtenataj fare de la internacia kultura komuneco, ĉar ili estas granda rezervo, konsiderinda potencialo por la estonteco.

UNESCO, kiel interregistara organizaĵo, uzas nun ses laborlingvojn, kio fakte estas lingva diskriminacio de grandaj kaj malgrandaj nacioj: iuj povas paroli en sia gepatra lingvo kaj aliaj, havante la tutan materialon — politikan, historian, kulturalan — estas devigitaj uzi alian lingvon, do, submetiĝi al lingva malavantaĝo. Memkompreneble, tiu ĉi situacio ne povas daŭri longan tempon. Ni scias, ke jam sepa nacia lingvo

estas enkondukota — la portugala. Ne estas malfacile antaŭvidi, ke alia eŭropa kaj unu afrika lingvoj, parolataj respektive en kvar kaj en tri landoj, baldaŭ aperos sur internacia scenejo, sekvotaj de unu azia lingvo, kiu posedas grandan materialon kaj kulturalan potencialon. Ĉar la lingvo ne estas nur komunikilo, sed ankaŭ prestiĝo, nacia fiero kaj avantaĝo, ni trovigas antaŭ lingva haoso, kiu provokus neimageblajn tradukajn malfacilaĵojn, presadon de grandega kvanto da materialoj, malpliigante la monrimedojn por realigo de niaj programoj. Eble tiam oni rememoros pri la ekzisto de iu lingvo, kreita servi por internaciaj kontaktoj. Tio estas Esperanto.

Tiu Internacia Lingvo, kreita de la pola kuracisto d-ro Zamenhof kaj publikigita en 1887, havas la avantaĝon esti politike kaj kulture neŭtrala, ne apartenanta al iu ajn el la politikaj potencoj. Ĝi ne altrudas fremdajn kulturojn al malgrandaj etnaj grupoj, estante ilian kulturalan sendependecon kaj evoluon. Ĝi povas esti uzata de ĉiuj kiel rimedo de internacia interkompreniĝo, forigante la lingvajn barojn, ĝuste kiel la telefono kaj aviadilo venkas la distan-

cojn. La 30 000 libroj publikigitaj en Esperanto — la duono de ili tradukitaj, la duono — verkitaj en Esperanto, samkiel multaj aliaj komunikiloj, pri kiuj mi jam menciis, inkluzive la viglan internacian korespondadon, pruvis la kapablon de tiu lingvo priservi ĉiuspecajn bezonojn de homa interkomunikado. Ĝia simpla kaj regula gramatiko sen iuj ajn esceptoj, kaj ĝia vortaro, ĉerpita el la internacia praktiko kaj el multaj naciaj lingvoj de ĉiuj kontinentoj, faras tiun lingvon facile lernebla: ĝi bezonas nur unu trionon de la tempo necesa por lernado de ĉiu alia lingvo. La konstanta akcento sur la antaŭlasta silabo de la vortoj, samkiel en hispana kaj itala lingvoj, faras ĝin belsona, muzika lingvo.

Mi finas kun bondeziro al la Prezidanto de la Generala Konferenco en Esperanto:

„Sinjoro Prezidanto, mi deziras al tiu ĉi elstara konferenco plenan sukceson en la solvado de ĝiaj multnombraj problemoj sub via kapabla kaj zorgema gvidado. Dankon!“

(El la bulteno de la Plenkunsido de la Generala Konferenco de UNESCO — Vr/22 prov., 21. 10. 1985, Sofio)

FUNKCIULO DE UN RICEVOS LA UNUAN PREMION „ZAMENHOF“

La Premion „Zamenhof“ lastatempe starigis Universala Esperanto-Asocio por honori ĉiujare personon de internacia reputacio, kiu signife kontribuis al la antaŭenigo de internaciaj komunikado kaj kompreniĝo.

Asista Generala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj s-ro Robert Muller ricevos la Premion „Zamenhof“ por Internacia Kompreniĝo por la jaro 1985, laŭ lastatempa anonco de la elekto-komitato por tiu premio. Sargita pri aranĝoj por festado de la Kvardeka Jubileo de Unuiĝintaj Nacioj en 1985, s-ro Muller estas bone konata kiel apoganto de internaciaj kunlaboro kaj kompreniĝo. Li estas ankaŭ subtenanto de Esperanto, kaj faris la inaŭguran paroladon en la 64-a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno en 1979. Oni oficiale prezentos al li al Premion „Zamenhof“ en Novjorko la 13-an de decembro 1985.

(Gazetara Komunikado de UEA, 20. 9. 85)

KONGRESO DE POLAJ ESPERANTISTOJ

En la ĉi-jara 23-a kongreso de Pola Esperanto-Asocio, kiu okazis en Poznań (12—17-a de aŭgusto) partoprenis 180 esperantistoj kaj gastoj el GDR, Bulgario, Belgio, Nederlando kaj Svedio.

Dum la solena malfermo la kongreson salutis reprezentantoj de la vojevodio estraro, de la ĉefa estraro de PEA kaj ankaŭ eksterlandaj gastoj. En la nomo de BEA kaj de la Plovdiva Distrikta Estraro de BEA salutparolis la bulgara reprezentanto Atanas Cokov.

La bulgara reprezentanto gastis en Poznań kaj partoprenis la kongreson dank' al invito flanke de Poznańska filio de PEA, kiu estas en amikaj rilatoj kun DE de BEA en Plovdiv. Dum interparoloj kun Poznańaj geesperantistoj estis interŝanĝitaj ideoj pri plivigligo de kontaktoj kaj kunlaboro inter la du ĝemelurbaj esperantistaj organizaĵoj.

A. C.

UNUA ILEF-FESTIVALO



Solena inaŭguro de la festivalo. Salutparolas la prezidanto de ILEF Dončo Ĥitrov.

Ora aŭtuno en Rodopi-montaro!

Arbaroj kaj valoj flamas per miloj da koloroj, karesataj de l'radioj de la aŭtuna suno. . .

„Carma Rodopi-montaro“ — sub tiu devizo en la unuaj tagoj de oktobro (5-12.10.85) en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisana estis realigita grava iniciato de la Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF): Unua Internacia Festivalo-Konkurso.

Kvankam vaste diskonigita, la komenco de tiu ĉi arango estis relative modesta: la festivalon partoprenis 41 ILEF-anoj el Bulgario, Finnlando, Hispanio kaj Jugoslavio. Estis anoncintaj sian aliĝon ILEF-anoj el Ĉeĥoslovakio, Rumanio, GDR, Svedio kaj USSR, sed bedaŭrinde ili ne alvenis.

En sia salutparolo dum la solena inaŭguro la prezidanto de ILEF Dončo Ĥitrov transdonis al la ĉeestantoj la bondezirojn de la Estraro de ILEF kaj de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio, kiuj morale kaj finance helpis la realigon de la festivalo. Li koncize rakontis pri la jam pli ol 20-jara aktivado de ILEF, pri ĝia kontribuo al disvastigo de Esperanto per kino, foto kaj magnetofono.

ILEF estas faka organizaĵo kunlaboranta kun UEA. Kun TEJA ĝi efektivigis union dum la 68-a UK en Antverpeno (1982) kaj nun ili sukcese kunlaboras.

Laŭ anticipe diskonigita programo la Unua ILEF-festivalo pasis en agrabla kolegeca kaj amika etoso, ĉe vigla interesiĝo de ĉiuj partoprenanto, en bonegaj labor- kaj vivkondiĉoj.

Por unua fojo en la praktiko de ILEF ne estis elektita speciala ĵurio — ĵuriis la prezentitajn verkojn ĉiuj partoprenantoj, kiuj libere esprimadis sian pritakson.

En la konkursa programo estis prezentitaj 20 koloraj kaj nigra-blankaj 16- kaj 18-milimetraj filmoj, sonigitaj en Esperanto. Kun granda intereso oni spektis la belegajn kolorfilmojn de nia hispana kolego kaj ILEF-estraro José Fernandez Arroyo el lia serio „Esperanto vojaĝas tra la mondo“ (Japanio, Nepalo, Bali-insulo, Kanariaj Insuloj, Hispanio, k. a.). Li prezentis ankaŭ du kolorajn filmetojn („Animo“ kaj „Vilaĝa festo“) de Kaoro Asaoka el Japanio, ILEF-estraro por Azio kaj Oceanio.

Grandan kolekton de filmoj kaj diapozitivaj prezentis la membroj de E-kinoklubo „Evridika“ el Smoljan. La temoj estis ĉerpi-taj el la ĉiutaga vivo de la regiono, estis prezentitaj ĝiaj naturbelaĵoj. Per siaj artaj kvalitoj distingiĝis la filmoj „Groto „Ulcata“, „Subteraj montoj“ kaj „Urbo estas konstruata“. Bonan impreson faris la eldonata de la klubo murgazeto „Kinematografo“ — eble unika en la mondo tre laŭdinda amatora iniciato!

Bonege sin prezentis Sofia Esperanto-Kinoklubo per la 16-mm kolora filmo „Verdaj steloj en Slanĉev Brjag“, pri 36-a IFEF-kongreso en 1984. Konstruadon de monumento omaĝe al ribeluloj pereintaj en la kontraŭfaŝisma ribelo en 1923 traktis la nigra-blanka filmo „Tomin-ponto“ de kinoklubo „Himik“ en Vraca. Ekster la konkurso estis projekciitaj la dokumentaj koloraj filmoj „Leciono de Esperanto“, „Bulgara somero“ kaj „Flugiloj super Bulgario“.

Neatendite riĉaj kaj altkvalitaj estis la prezentitaj 8 fotokolektoj, ĉiu el kiuj estis siaspeca aŭtora foto-ekspozicio. Per majstre elektitaj objektoj (pejzaĝoj, portretoj, foto-ŝercoj k. a.) elstaris la kolektoj de Bogomil Prodanov el Lom (fotoj kaj diapozitivaj), de Plamen Mladenov el Sofio kaj de Stojan Pavunĉev el Vraca. Laŭ komuna pritakso iuj el iliaj verkoj superas la majstrecon de profesiuloj. Tre bonaj estis la kolektoj de Kiril Kalĉev el Loveĉ, de Aleksej Ĥristov el Sofio, de Ĥristina Nikolova el Pazargik kaj de Vasil Frenkev el Smoljan. Bonege sin prezentis ankaŭ la magnetofona kaj diapozitiva sekcioj.

Petko Arnaudov el Pazargik, ILEF-estraro, aŭdigis unikajn surbendigojn de eldiroj de elstaraj esperantistoj: akademiano Bokarjov, la E-poetoj K. Gusev kaj Petro Poliŝĉuk el Sovet-Unio, la poeto-verkisto kaj tradukisto Asen Grigorov el Bulgario, k. a. La alia surprizo estis diapozitivaj de Anatoli Prodanov el Lom. Se la patro (Bogomil Prodanov — vidu supre!) prezentis bonegajn fotitajn realismajn objektojn, la filo montris belegajn kolorajn diapozitivajn, kiuj indas esti presitaj en aparta albumo. La projekciado de ambaŭ kolektoj — de patro kaj filo, estis vera plezuro por ĉiuj. Pli ol 1000 diapozitivaj estis montritaj dum la festivalaj ta-



TELEGRAMO

Al la Itala Ambasado en Popola Respubliko Bulgario

La partoprenantoj en la Unua Internacia Festivalo de Esperantistoj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj, okazinta en Bulgario, la 5—12-an de oktobro 1985, esprimas sian profundan maltrankviliĝon pri la sorto de la bulgara civitano Sergej Antonov, senmotive akuzita pri atenco kontraŭ papo Joano-Paŭlo la Dua.

Ni, kiel multaj aliaj homoj en la mondo, estas konvinkitaj, ke la itala justico nepre forjetos la monstrajn akuzojn de aventuristoj kiel la turka krimulo Ahmed Ali Akĝa kaj liaj kunagantoj, ke la vero triumfos kaj Sergej Antonov estos liberigita.

Tia saĝa ago fare de la itala tribunalo estas atendata de ĉiuj honestaj homoj en la mondo, al kiuj estas kara la homaj rajtoj kaj la paca interpopola kompreniĝo.

Al ilia protesto aligas sian voĉon ankaŭ la partoprenantoj en la ILEF-festivalo, kiuj per sia agado kontribuas por konservado de la paco kaj por amikeco de ĉiuj homoj en la mondo.

De la partoprenantoj en ILEF-Festivalo
La 10-an de oktobro,
IEK-Pisanica, Bulgario

TELEGRAMO

Al la Itala Ambasado en Popola Respubliko Bulgario

Kun maltrankvilo kaj espero ni observas la disvolviĝon de la juĝproceso kontraŭ nia samlandano Sergej Antonov.

Maljuste akuzita, arestita kaj malliberigita en daŭro de preskaŭ tri jaroj, for de Patrolando kaj familio, senigita je normala vivmaniero, li devas defendi sin kaj provi sian senkulpecon.

Ni esperantistoj el Smoljan, profunde indignitaj pro la monstraj akuzoj kontraŭ nia samnaciانو, protestas kaj alvokas al Via konscienco de justaj homoj al urĝaj agoj por demeto de tiaj gravaj kulpigoj kaj por liberigo de Sergej Antonov. Nun, kiam la paco sur nia planedo estas minacata kaj ĉiuj progresemaj homoj alvokas al la homa racio por prevento de eventuala nuklea katastrofo, triumfo de la vero en la juĝproceso de Antonov estos kontribuo al la batalo por paco kaj kompreniĝo inter la popoloj, estos plia pruvo pri la kompetenteco kaj konscienco de la itala justico.

Distrikta esperantista organizaĵo, u. Smoljan,
la 9-an de oktobro 1985



goj — tre granda kvanto por modesta komen-
col. . .

Ĉiu aparta konkursaĵo estis vigle diskutata kaj pritaksita de la partoprenantoj, kio estis utila interŝanĝo de sperto.

La bonega suna vetero ebligis al la festivalanoj ĝisstate foti kaj filmi laŭplaĉe la belegajn ĉirkaŭaĵojn de Pisanica kaj dumekskursoj — urbon Smoljan, Aĝuŝev-konak (unika en Bulgario mezepoka kastelo), vilaĝon Siroka Lâka (rezervejo de tipa rodopa arkitekturo) kaj la faman ripozlokon Pamporovo kun la televida turo sur montopinto Sneĵanka.

Grava momento en la festivala programo estis la vizito ĉe la prezidantino de Komunuma Konsilantaro pri Kulturo en Smoljan Vaska Pepelanova. Donĉo Hitrov esprimis la dankon de la festivalanoj pro la montrita al ili estimo kaj informis ŝin pri ILEF kaj pri la festivalo. Siaflanke la dommastrino informis la ĉeestantojn pri la atingoj de la laboruloj el la distrikto de Smoljan en la sociala kaj kultura sfero kaj pri la perspektivoj de plua evoluo de tiu mirinde bela rodopa centro.

La plej gravaj momentoj de la festivala programo inkluzive la karnavalan adiaŭan vesperon estis filmitaj de skipo de Bulgara Televido.

Dum la solena fermo de la festivalo en sia konkluda parolo la prezidanto de ILEF dankis tutkore ĉiujn partoprenintojn pro ilia sindonemo kaj valoraj kontribuadoj. Li esprimis sian personan kontentiĝon pri la rezultoj de la festivalo kaj sciigis, ke la kvar unuaj premioj — metaloplasto de fluganta kolombo, disdonitaj por ĉiu aparta fako de la festivalo, estas verkoj de nia hispana amiko José Arroyo kaj donaco de Madrida Esperanto-Liceo! Sian elkoran dankon oni esprimis per tondraj aplaŭdoj.

La partoprenantoj en la festivalo unuanime aprobis telegramon al la ambasado de Respubliko Italio en Sofio. La telegramon ni publikigas aparte.

La Unua Festivalo-Konkurso de ILEF — „Ĉarma Rodopi-montaro“, estas sukcesplena, kuraĝiga paŝo al novaj internaciaj aranĝoj kaj pruvo pri la vigleco kaj utila agado de esperantistoj-kino-foto-magnetofon-amatoroj.

IEK — Pisanica,
oktobro 1985

Radi BANCĖVSKI

La partoprenantoj en la festivalo ĝisstate fotis kaj filmis. . .



La kvar grandaj premioj de la festivalo
Fotoj: Kiril Kalčev

LA PREMIITOJ

I. FAKO „KINO“

- Speciala premio** — al **José Fernandez Arroyo** el Hispanio, pro lia tuta kolekto de filmoj kaj diapozitivoj, kun danko pro la valora donaco de la Madrida Esperanto-Liceo
- Granda premio** — „**Arĝenta Kolombo**“ — al **Sofia Esperanto-kinoklubo** pro la filmo „Verdaj steloj en Slânčev Brjag“
- Unua premio** — al **Esperanto-kinoklubo „Evrídika“** el Smoljan, pro ĝia kolekto de filmoj
- Dua premio** — al la kreintoj de la filmo „**Subteraj montoj**“ (Smoljan)
- Tria premio** — al la kreintoj de la filmo „**Tomin-ponto**“ — kinoklubo „**Himik**“, Vraca
- Honora premio** — al **Kaoro Asaoka**, Japanio, pro liaj filmoj „**Animo**“ kaj „**Vilaĝa festo**“

II. FAKO „FOTO“

- Granda premio** — „**Arĝenta Kolombo**“ — al **Bogomil Prodanov** el Lom, pro lia kolekto de fotoj kaj diapozitivoj
- Dua premio** — al **Plamen Mladenov** el Sofio, pro lia serio da portretoj
- al **Stojan Pavunčev** el Vraca, pro lia kolekto de pejzaĝoj kaj infanportretoj
- Tria premio** — al **Kiril Kalčev** el Loveč, pro lia originala kolekto pri temo „**Vintra korpohardado**“
- Kuraĝigaj premioj** — al **Ĥristina Nikolova** el Pazarĝik
- al **Aleksej Ĥristov** el Sofio
- al **Vasil Frenkev** el Smoljan

III. FAKO „MAGNETOFONO“

- Granda premio** — „**Arĝenta Kolombo**“ — al **Petko Arnaudov** el Pazarĝik pro liaj unikaj surbendigoj de la voĉoj de eminentaj esperantistoj

IV. FAKO „DIAPOZITIVOJ“

- Granda premio** — „**Arĝenta Kolombo**“ — al **Anatoli Prodanov** el Lom, pro lia kolekto de koloraj diapozitivoj
- Kuraĝiga premio** — al **Todor Marinov** el Smoljan, pro lia kolekto de koloraj diapozitivoj „**Fruktoj de la aŭtuno**“.

Tria Kooperativa E-Konferenco

La Instrua Centro de la Centra Kooperativa Unuiĝo en urbo Plovdiv estis ornamita per kooperativaj kaj, por unua fojo, per esperantaj standardoj. De la 27-a ĝis 30-a de septembro j. k. tie ĉi okazis la Tria Kooperativa Esperantista Konferenco. Super la enirejo oni legis sloganon: „Esperantistoj kaj kooperativanoj — unuecaj por defendo de la paco“. La konferencon partoprenis pri ol 105 kooperativanoj kaj gastoj el Hungario, Anglio, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio, Pollando, Rumanio kaj Bulgario.

La konferencon malfermis Ĥristo Gorov — prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio. En sia salutparolo li substrekiis, ke BEA subtenas la ideon pri organizo de internacia unuiĝo de esperantistoj-kooperativanoj.

Salutparolis Stojan Ljahov — prezidanto de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto en la nomo de la urba societo, d-ro Jozsef Pál — prezidanto de Preparkomisiono, Johano R. Harrison — sekretario de TUCEG (Sindikata Kooperativa Esperanto-Grupo); inĝ. František Havlik (ĈSSR), Zbignew Rosiak (Pollando), k. a.

La bazan raporton „La kooperativanoj kaj la junularo“ prezentis Milan Milanov — prezidanto de la Kooperativa E-Sekcio. Li substrekiis la pretecon de multaj gejunuloj eniri la kooperativojn, ĉar al ili estas proksimaj la demokratiaj principoj pri unuiĝo kaj konstruo de pli justa ekonomia ordo. La junularo nun orientiĝas al la teknika progreso. Tiudirekte la kooperativa sistemo donas eblecon por memrealiĝo, profesia kvalifikado ktp.

En siaj eldiroj la parolintoj tuŝis apartajn problemojn de la kooperativa agado — kulturajn, organizajn, ekonomiajn, sportajn k. a. Ĉiuj havis eblecon esprimi siajn opiniojn, interŝanĝi sperton, lanĉi novajn ideojn. Oni prezentis multajn faktojn pri la sukcesa laboro de kooperativanoj kun la junularo.

En la rezolucio pri estonta agado de la kooperativa E-movado, prezentita de Dimităr Mutuŝev — prezidanto de la Kooperativa Sekcio ĉe BEA, estis starigitaj la plej gravaj taskoj: la estraroj de la E-organizadoj devas aktive kunlabori kun gejunuloj, al kiuj ili starigu respondecajn taskojn; oni devas trovi taŭgajn formojn de organiza laboro por disvastigo de Esperanto inter la kooperativanoj; eldonadi materialojn en Esperanto kaj informadi la kolegojn el aliaj landoj; organizi seminariojn, renkontiĝojn k. a.; popularigi la iniciatojn de ICEM (Internacia Kooperativa Lernejo Moderna); labori por celdirektita preparo de favoraj kondiĉoj kaj bazaj dokumentoj

por fondo de Internacia Kooperativa E-Organizaĵo k. a.

Resonante al la nuntempaj bezonoj, la konferenco unuanime akceptis Alvokon por partopreno de kooperativanoj-esperantistoj en la batalo por paco kaj malarmado, prezentita de Ferenc Jaki. Entuziasme estis akceptita la salutletero de d-ro Imre Pethes — membro de la Monda Packonsilio kaj prezidanto de MEM.

La partoprenantoj esprimis unuanime sian kredon, ke en la jubilea jaro 1987 la kooperativanoj-esperantistoj sukcesos fondi enkadre de UEA sian organizaĵon, kiu laboros por utiligo de Esperanto sur la kooperativa kampo kaj por profesiaj celoj.

La Tria Kooperativa Esperantista Konferenco estas nova paŝo al kreo kaj evoluo de la internacia kooperativa esperantista movado.

D. ATANASOV

Kvina IMEK en Schwerin

La V Internacia Medicinista E-Konferenco okazis de la 8-a ĝis la 14-a de septembro j. k. en la bela distrikta urbo Schwerin, GDR. La konferencejo estis en la Domo de la Kulturo, apud unu el la multnombraj lagoj en la urbo-centro. Por interŝanĝo de spertoj en Schwerin renkontiĝis pli ol 90 medicinistoj-esperantistoj el Bulgario, Hungario, GDR, USSR, Pollando, Svislando kaj Islando. Dum la solena malfermo salutparolis d-ro Brosche — prezidanto de la Organiza Komitato, d-ro Detlev Blanke — sekretario de GDREA, membroj de la urba E-estraro. Salutparolis ankaŭ reprezentantoj de alilandaj delegitaroj kaj faris belajn donacojn al la organizantoj.

La plimulto de la prelegoj en la programo estis ligitaj kun la ĉefa temo: „Sana junularo — tasko, respondeco kaj sindevigo por ĉiuj“, kiu bone ligiĝas kun la Internacia Jaro de Junularo. Prelegis specialistoj pri infanaj, internaj, psikaj k. a. malsanoj, dentkuracistoj, veterinaroj. Naŭ temoj traktis la profilaktikon de malsanoj, tri estis rezulto de multjaraj observoj kaj ĝeneraligoj. Gravaj por la praktiko estas la rezultoj de rentgenologiaj esploroj, la prelegoj pri kampilobakteriaj infektoj. Interesaj estis ankaŭ la raporto pri UV-radioterapio de sango (GDR) kaj pri la apliko de mempreparita alojo por dentprotezoj (Pollando). La bulgaroj prezentis 10 prelegojn (Sofio — 4, Plovdiv — 1, Pleven — 2, Ŝumen — 2, Vraca — 1). La 9-an de septembro vespere, okaze de la nacia festo de Bulgario, estis prelego „Pri la rolo de medicinistoj en la bataloj de la bulgara popolo“.

La ĉi-jara IMEK montris la neceson de medicina terminologio en Esperanto. Oni pri-taksis la Terminaron de d-ro Ĥradil (ĈSSR)

kiel tre utila, sed nesufiĉa paŝo al solvo de la problemo. Laŭdinda estas la laboro de s-ino Wera Dehler (GDR), kiu surbaze de riĉa sperto, sukcesis kompili la plej esencajn principojn, treege necesajn dum la terminologia laboro. Si alvokis ĉiujn partoprenantojn mem kontribui kaj instigi siajn kolegojn al terminologia laboro. D-ro Brosche rakontis kiel li okupiĝis pri veterinara terminologio; d-ro Szmöck — pri la kreintoj de stomatologiaj terminoj. La prelego de d-ro Berr „Distribuita Lingva Tradukado (DLT): duonaŭtomata lingvo-traduka sistemo kaj la rolo de Esperanto en ĝi“, montris la gravan eblecon elprovi Esperanton en la praktiko, konforme al la teknika progreso kaj la urĝa neceso de plua evoluigo de la faka leksiko.

La afablaj dommastroj montris al ni ambulatorion, poliklinikojn, modernan distriktan hospitalon kun multaj sanlaboristoj, bonaj specialistoj pri diversaj malsanoj, moderna aparataro kaj kuracmetodoj. Ĉie estis videblaj zorgoj pri la homa sano.

Vizito de muzeoj, de urbo Güstrow, muzikaj dancprogramoj, ekskurso sur la lago de Schwerin kaj aliaj amuzaraĝoj riĉigis la programon.

Ce la fermo de IMEK '85 oni pritaksis la organizadon kaj rezultojn de la konferenco kiel bonaj. D-ro Ferenzy, prezidanto de UMEA, esprimis sian kontentecon pri la farita laboro kaj sian gojon vidi tiom multe da junaj partoprenantoj. Li substrekkis, ke la alvoko „... ankoraŭ pli energie agadi por paca kunekzistado kaj malarmado, por mondo sen milito, en kiu plenkreskos sana junularo...“ devas esti sankta devo de ĉiu esperantisto-medicinisto.

P. ĈOLAKOVA-BOJAĜIEVA

14-A FOIRA INTERNACIA RENKONTIGO (FIER)

La 27—30-an de septembro ĉi-jare en Plovdiv okazis 14-a FIER, dediĉita al la 100-jara datreveno de la Unuiĝo de Bulgario. La tuta programo de la renkontigo estis ligita kun tiu ĉi grava historia evento.

La 28-an de septembro matene okazis speciala solenaĵo. Pri la signifo de la Unuiĝo por la bulgara popolo parolis Fani Miĥajlova. Estis organizita interesa kvizo „Kion vi scias pri la Unuiĝo?“ Gajnis Asen Josifov (Sofio) kaj Veselina Kurteva (Plovdiv). Poste la partoprenantoj vizitis la nacian belartan ekspozicion pri la Unuiĝo de Bulgario, aranĝitan en la halo de la ĉefa poŝtoŝtanco. La partoprenantoj en FIER ekskursis al u. Sâedinenie, kie ili vizitis la monumenton de herooj de la Unuiĝo kaj la muzeon de la Unuiĝo. Reprezentanto de la loka komitato de Patrolanda Fronto rakontis pri la historiaj eventoj okazintaj antaŭ 100 jaroj en la iama vilaĝo Goljamo Konaŭre (nun u. Sâedinenie).

FIER pasis en agrabla, amika etoso.

Vladimir JELEV

LA HUMANISMA MESAĜO DE ZAMENHOF

La datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof estas por ni okazo demandi: kiujn ideojn de la fondinto de Esperanto ni esperantistoj realigas, pli aŭ malpli modifitaj? Mi sekve volas klarigi iomete nur kelkajn.

Multnombro da libroj kaj artikoloj naci- kaj esperantlingve ĝis hodiaŭ aperis pri Zamenhof. Eminentuloj de la Esperanto-movado kiel Edmond Privat, Gaston Waringhien, Marjorie Boulton kaj Ernest Drezen skribis pri Zamenhof. Ni konas biografiojn de la polino Maria Ziołkowska kaj de la japano Ito Kanzi, artikolojn de Maimon, Holzhaus kaj Murgin. La listo ne estas kompleta.

Iliaj pensoj kaj konkludoj estas tre diversaj. La marksisma pensmaniero de Drezen kaj Murgin memkompreneble kondukas al tute alia Zamenhof-bildo ol tiu de burĝaj aŭtoroj, sed ankaŭ la Zamenhof-bildo de la burĝaj aŭtoroj diferencas evidente. Kial tiaj diversaj aŭtoroj kun absolute diferencaj aŭ eĉ kontraŭaj mondkonceptoj povas nodiĝi al la ideo de Zamenhof? Mi opinias, ke tio okazas eble pro la kontraŭdiroj en la pensado de Zamenhof mem.

En la jaro 1905 Zamenhof skribas leteron al Michaux, en kiu li konfesas: „... interne en mi konstante bataladis reciproke diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj“. Tiuj internaj kontraŭdiroj memkompreneble kreskis el la sociaj kontraŭdiroj. Białystok kaj Varsovio, kie Zamenhof travivis la plej grandan parton de sia vivo, situis en tiu parto de Pollando, kiun la rusa carismo regis. La tempo, en kiu li maturiĝis al viro — la 70-aj ĝis 90-aj jaroj de la pasinta jarcento — estis tempo de rapida evoluo de kapitalismo fine transiranta al imperiisma stadio. Zamenhof rigardis tiun evoluon el la vidpunkto de etburĝa intelektulo. Lia patro, instruisto de lingvoj, ne edukis la filon al batalo kontraŭ la carisma subpremo. Li sekvis la ideologion de pozitivismo, kiu en la liberala periodo de la burĝaro de Pollando estiĝis kaj ankaŭ influis la kreinton de Esperanto.

Ne estas hazardo, ke Zamenhof tradukis el la pola lingvo esperanten verkon de Eliza Orzeszkowa, eminenta reprezentantino de la pozitivismo en la pola literaturo. Temas pri la romano „Marta“, kies centra problemo estas la emancipado de la virino. 7 jarojn post la apero de la unua lernolibro li eldonis sian tradukon de la Sekspira dramo „Hamleto“. La humanisma mesaĝo de tiu dramo estas mesaĝo, kiu evidentiĝas ankaŭ la strebado de la tradukinto al humanisma agado. La kontraŭdiron

inter la idealaj potencoj de la homo kaj la stato de la mondo Zamenhof sentas en sia tempo same kiel la heroo de tiu dramo siatempe.

En la jaroj antaŭ la 1-a mondmilito, kiam grandparte en la burĝaro de diversaj landoj regis ŝovinismaj kaj militarismaj konceptoj, la de Zamenhofaj pensoj influita pacifisma Esperanto-movado kondamnis rasismon, ŝovinismon kaj militarismon.

Mi ne volas skizi la principojn de la lingvokreado de Zamenhof, mi nur konklude volas konstati, ke tia lingvokreado supozigas, ke Zamenhof rigardis la lingvon ne kiel donacon de Dio, sed kiel socian fenomenon, fareblan kaj ŝangeblan de la homo. Ankaŭ ĉi tiu penso de Zamenhof enhavas realismon kaj translimas lian idealismon.

En la Deklaracio pri Homaranismo li skribis en 1913: „Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kian ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas. La servadon speciale al la intereso de unu gento aŭ la malamon kontraŭ alihejmuloj mi neniam devas nomi patriotismo“. Patriotismo kaj internaciismo por Zamenhof ne estas kontraŭaj aferoj. Ago por la intereso de la propra popolo devas inkluzivi agadon por intereso de la tuta homaro. Por li estis kontraŭaĵoj naciismo kaj patriotismo. Kaj vere, en lia tempo evidentiĝis, ke la naciismo ne nur damaĝas al aliaj popoloj, sed ankaŭ al la propra popolo. Nuntempe ni povas observi la samon. La Usona naciismo kontraŭas la interesojn de la tuta homaro same kiel la interesojn de la propra popolo. La politiko de konfrontado kaj vetarmado ankaŭ nin minacas. Sed hodiaŭ la pacaj fortoj, aliel ol en la tempo de Zamenhof, estas pli fortaj kaj havas materian bazon en la socialismaj landoj. La registaroj de la socialismaj ŝtatoj defendas homarajn interesojn en konsento kun la intereso de ĉiuj popoloj. En la socialisma socio akordiĝas patriotismo kaj internaciismo, enkadre de imperiisma socio pro la klasaj kontraŭdiroj tio estas iluzio. Liaj rimedoj — la internacia lingvo kaj la homaranismo — ne estas taŭgaj eviti pluan militon, sed liaj verkoj kaj pensado efikas ĝis hodiaŭ.

La internacia lingvo Esperanto pruvis sian taŭgecon faciligi la interkompreniĝon de la popoloj. La humanismaj celoj de Zamenhof, lia agado por la paco estas por ni devo al respondeplena agado en nia tempo konsiderante la spertojn de la historio.

Fritz WOLLENBERG

(El „Der Esperantist“, n-ro 6/84, kun mallongigoj)

PREMIITA POEZIAJO

En revuo „Esperanto“ (1984,10) estas publikigita la poezia verko, premiita per unua premio en la belarta konkurso de UEA — 1984. La verko estas de Maŭro Nervi kaj havas titolon „Fumo“.

La publikigo devas esti rigardata ne nur kiel informo pri la decido de la juĝkomisiono, sed ankaŭ kiel prezento de la verko por pritakso fare de pli larĝa „juĝkomisiono“ — la publiko.

La ĉi-sekvaj rimarkigoj estas reago al la tiel proponita eblo.

La unua demando, kiun la leganto direktas al la literatura verko, estas la demando: kion diras la verko?

Do, ĉi-tiun demandon ne povas eviti ankaŭ la premiita verko „Fumo“.

Kion diras ĝi?

„Pensojn alcelas fajra kokaino/en ambaŭ ni;“

Tiu ĉi enkonduko sugestas bildon pri du homoj (ni nomu la unuan aŭtoro, la duan alia persono), kiuj prenis kokainon kaj la „fajro“ de la kokaino akcelis ties pensojn.

Post la preno „nur drogo versornamas/la blankon de l'foli“. Eble la aŭtoro deziras diri, ke la efiko de la kokaino konsistas „nur“ en tio, ke ĝi igis ambaŭ versi kaj skribi la versojn — „versornami la blankon de l'foli“.

Sekvas tamen jeno:

„Poemsordino/mian kapablon dampas, kaj mi pramas/tra via haŭto kaj racia penso/dis-
onde. . .“

Kiu estas tiu ĉi „poemsordino“? Ĉu la drogo? Sed ĝi estas „fajra“, tute ne sordino. Ĝi „akcelas pensojn“, ne „dampas“. Interese estas, ke la poemsordino dampas nur la kapablon de la aŭtoro, ne la kapablon de la alia.

La aŭtoro „pramas tra via haŭto kaj racia penso“. Al kiu rilatas tiu ĉi „via“? Aparte interesa tamen estas la metaforo, priservita per la verbo prami. Prami tra racia penso iel tiel akcepteblas, sed prami tra haŭto? Eĉ la plej toleranta metaforo malkonsentus preni sur sin tian funkcion.

Des malpli jenan:

„...vel ĉi-plum' mokinde lamas/en la labirintoj de la sensintenso/kie aero svage disfluktua/forsvenas, senparfuma volvincenso...“

en kiu la aero „forsvenas“, ne paroli pri „senparfuma volvincenso“, kie ĉiu klopodo „traduki“ la metaforon restas senrezulta.

Sekvas:

„Pampelmus' (sur mia lito, kaj ektuŝ' unua) de ŝia frunto. La amiko ĵus sidigis apud mi.“

Nun la leganto ekscias kelkajn novajn momentojn: unue, ke ĉio okazas en ĉambro („lito“) due, ke la dua persono estas ŝi kaj trie, ke venas tria persono, kiu „ĵus sidigis“.

Plue:

„Hej, krias knabo sur la trotuaro/mallarĝa! En ĉi flagra menstumulto/enormas bru': sed varma fajroklaro/intim-silentas.“

Krio sur trotuaro („mallarĝa“) kaj ĉi. . . menstumulto“ (ĉu sur la trotuaro?) kaj enorma bruo (ĉu pro la krio de la knabo?)!

Ankoraŭ plue:

„Sunumita ŝultro/kaj Donald Duck sur la tolaĵo flava/de ĉi vespero jen la bonrezulto:“

Kio estas la rezulto? La „sunumita ŝultro“? Kies ŝultro? Kaj kie ĝi sunumigis? Ĉu en la ĉambro? Kaj kiu estas Donald Duck? Ĉu la leganto devas scii kiu kaŝigas sub Donald Duck?

La du punktoj post la strofo tamen refutas la konkludon, ke la rezulto konsistas en „sunumita ŝultro kaj Donald Duck“. La du punktoj estas sekvataj de alia rezulto:

„ni ŝtelis ion en la nokto kava“

Do, kio estas la kialo kaj kio la rezulto?

La verko finiĝas per jena enigma fino:

„Sajnas ne tro grava/nia sekreta lumsoif': klopodo/al fino pli baldaŭa, kaj brokanto/de niaj lacaj korpoj. . . Sur komodo/ flavgajaj foliar' de helianto.“

La demando, kun kiu la leganto komencas legi la verkon, ankaŭ post la tralego restas nerespondita.

Kian respondon trovis la juĝkomisiono?

Ljubomir MIHAJLOV

STIPENDIO „100 JAROJN ESPERANTO“

Laŭ la imitinda iniciato de la sofiaj esperantisto DE de BEA en Stara Zagora ankaŭ disponigis monri medojn por stipendio, dediĉita al la centjara jubileo de Esperanto. La stipendiulino el Stara Zagora — Pepa Momčilova, estas studentino en tria kurso de la Universitato en u. Veliko Târnovo — fako „Franca Filologio“. Si ricevos ĉiumonate dum du lernojaroj stipendion de 50 levoj kaj sin devontigas: fini dum du jaroj (1985—1987) la 4 gradojn de la lingva posedo; dum la periodo de stipendiado havi tre bonan sukceson en la studado, esti membro de iu E-societo kaj aktive labori en ĝi. Fininte sian superan kleracon, ŝi sin devontigas en daŭro de kvin jaroj instrui Esperanton.

DE de BEA sendos la stipendiulinon en la Internacian Esperanto-Kursejon (Pisanica), por ke ŝi finu la kvaran gradon de lingva posedo (por instrurajtoj), kaj pagos la koncernan takson.

Kiel oni informas, DE de BEA preparas la subskribon de ankoraŭ du kontraktoj pri la stipendio „100 jarojn Esperanto“.

Ni alvokas ĉiujn distriktajn estrarojn de BEA sekvi tiun imitindan ekzemplon, ĉar tiamaniere ili kontribuos por altiro de inteligentaj kaj kvalifikitaj E-instruantoj kaj junaj aktivuloj.

„BE“



DONČO ĤITROV JUBILEAS

Verŝajne neniu povus supozi, ke tiu ĉiam ĝentile ridetanta grizhara juna homo — nia ĉefredaktoro Dončo Ĥitrov, jam estas 60-jara!

Lia vivo povas esti ekzemplo de obstina laboremo kaj sciemo. Kiel lernanto en la klasika fako de Unua Sofia Knaba Gimnazio li ellernas latinan, rusan kaj francan lingvojn. Esperanton li lernas laŭ la lernolibro de sia parenco la eminenta esperantisto d-ro Panajot Ĥitrov. Li multe legas, revas pri ĵurnalista profesio. Estas redakciano de la revuo „Lernejana Impeto“ — eldono de la sofiaj gimnazioj. Kreskante en familio kun progresemaj mondkonceptoj, li estas intima amiko de samklasanoj — anoj de la tiam eksterleĝa Komsomolo, de kiuj li ricevas marksisman literaturon.

Post la Dua Mondmilito li estas foresta studento en la Supera Ekonomia Instituto „Karl Marx“ en Sofio kaj jam laboras kiel redaktoro en revuo „Filmaj Novaĵoj“, eldonata ankaŭ en Esperanto. Kiel filma ĵurnalisto D. Ĥitrov estas tre produktiva: publikigas recenzojn, raportojn, intervjuojn en la centra kaj loka gazetaro, kunlaboras al la radio kaj televido, verkas scenarojn por dokumentaj kaj pentritaj filmoj, estas oficiala korespondanto de kelkaj fremdlandaj filmaj revuoj („Film“ kaj „Ekran“ — Pollando, „Film a Divadlo“ — ĈSSR, „Time and Tide“ — Hindio). Li estas aŭtoro de tre originala libro „En la mirinda mondo de la kino“, baldaŭ aperonta ankaŭ en Esperanto. Al lia plumo apartenas du scienc-esploraj verkoj: „La filma

perioda gazetaro en Bulgario — 1913-1944“ kaj „Hungaraj filmoj en Bulgario dum la periodo 1939-1944“.

En 1965 D. Ĥitrov finas ankaŭ la Ĵurnalistan Fakultaton de la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“. Li estas membro de la Unuiĝo de Bulgaraj Ĵurnalistoj.

De 1968 ĝis 1972 D. Ĥitrov estas redaktoro en Agentejo „Sofia Press“, kie li kunlaboras al revuo „Bulgario“, eldonata ankaŭ en Esperanto. De 1972 ĝis 1978 li estas respondeca redaktoro de la Bulgara Nacia Filмотеко kaj ĝia eldono „Kino kaj Tempo“, en kiu li publikigas multajn sciencajn esplorojn. Du jarojn li gvidas la Internacian Fakon de „Bulgara Kinokroniko“ kaj ekde 1981 estas ĉefredaktoro de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Li multon faris por plibonigo kaj pliriĝigo de la revuo.

La esperantista aktivado de Dončo Ĥitrov estas ampleksa. Li estas regula membro de BEA ekde 1956. La 36-a kongreso en Pleven elektas lin membro de CK de BEA. Li fondas Bulgaran Esperanto-Kinoklubon kaj dum la 48-a UK de Esperanto en 1963 en Sofio li laboras en la Kongresa Gazetara Servo kaj samtempe gvidas la filmadon de la kongreso. Dum la sama kongreso estas fondita Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF), kaj li estas elektita kiel ĝenerala sekretario de tiu ĉi organizaĵo. En 1978 D. Ĥitrov estas gvidanto de la Gazetara Servo de 63-a UK de Esperanto en Varna, eldonas ĉiutagajn esperantajn kaj bulgarlingvajn informbultenojn. Laŭ lia scenaro estas filmitaj kongresaj aranĝoj. En tiu kongreso la Ĝenerala Kunveno de ILEF elektas lin prezidanto de la organizaĵo.

D. Ĥitrov estas redakciano de revuo „Internacia Ĵurnalisto“, organo de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA) kaj ties ĝenerala sekretario.

En 1984 li estas gvidanto de la Gazetara Servo de la 36-a Kongreso de Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj (IFEF), kiu eldonadis ĉiutagan bel-aspektan kaj riĉenhavan informbultenon en Esperanto. Laŭ scenaro kaj sub la gvido de D. Ĥitrov la Sofia Esperanto-Kinoklubo kreis 30-minutan koloran dokumentan filmon pri la kongreso, titolitan „Verdaj steloj en Slančev Brjag“. La filmo estis projekciita kun sukceso en Bulgario kaj en aliaj landoj; ĝi gajnis la Grandan Premion — „Argenta Kolombo“ — de la Unua ILEF-festivalo en Pisanica ĉi-jare.

Dum la ĉi-jara 41-a kongreso de BEA D. Ĥitrov estis elektita membro de la Buroo de CE de BEA.

Kun plej sinceraj sentoj kaj estimo ni bondeziras al nia kara jubileulo fortan sanon kaj vignecon en lia multflanka aktivado por la prospero de la Esperantomovado.

LA REDAKCIANOJ
DE „BULGARA ESPERANTISTO“

„Bulgara Esperantisto“

MONATA ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO


- Unu el la plej malnovaj E-revuoj en la mondo — fondita en 1919
- Aktualaj problemoj de la E-movado en Bulgario kaj en aliaj landoj
- Libera tribuno de la leganto

Jarabono por 1986: por Bulgario — 2,90 lv.
por socialismaj landoj — 5,42 lv.
por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90 lv.

Tiuj, kiuj ne sukcesis aboni la revuon, povas pagi la abonkotizon al la kancelario de BEA aŭ sendi ĝin per poŝtmandato al la adreso de la redakcio: 1303 — Sofio, bul. „Hristo Botev“ 97 — por „Bulgara Esperantisto“.

Esperantaj societoj, esperantaj aktivuloj — ni nepre plenumu la decidon de la 41-a kongreso de BEA: ĉiu esperantisto — abonanto de „Bulgara Esperantisto“!

LA REDAKCIO



NI RECENZAS

Nova lernolibro

Neno Janev. Ekzercaro por elementa kurso de Esperanto. Sofio 1985, formato 15×20,5 cm, 112 paĝoj, prezo 0,65 lv.

Apero de nova lernolibro estas evento por nia landa movado. Unue, ĉar tiaj necesegaj por la disvastigo de Esperanto libroj tre malfacile naskiĝas (kaj la laborego estas malinstige rekompencata), kaj due—inter la ekzistantaj ne ĉiuj estas altkvalitaj, sed la kursgvindantoj devas ilin aĉeti vole-nevole, ĉar ofte sur la merkato estas nura lernolibro.

Pro tio ni bonvenigas la lernolibron de la elstara lektoro Neno Janev. Ĝi prezentas frukton de multjara sperto en la E-instruado, esploro de multaj lernolibroj kaj metodoj kaj de persista laborado.

La lernolibro komenciĝas per klarigo de la alfabeto kaj de tiuj konsonantoj, kiuj havas iujn specifikajn disde aliaj eŭropaj lingvoj. Estas prezentitaj ankaŭ la nombroj ĝis dek, ĉar ili estas ofte uzataj en la postaj lecionoj. La aŭtoro donas interesan mnemonikan regulon komparante kun uzataj en la bulgara lingvo vortoj (unu—unikalen, du—duet, tri—trio, kvar—kvartet, sep—septemvri, ok—oktomvri ktp.).

Klarigante la substantivon li ilustras ĝin ekskluzive per internaciaj vortoj, uzataj en la bulgara lingvo. Tiun principon li sekvas plue. Ĉe la adjektivoj: inteligenta studento, eleganta artisto, romantika poeto, nova ĵurnalo, granda hotelo, moderna muziko, oficiala dokumento, teatra salono, klasika literaturo. Tio, plus la abundaj ilustraĵoj, faras la lernolibron tre taŭga kaj alloga. La aŭtoro iom post iom enkondukas novajn elementojn, novajn vortojn kaj formojn. La konversacia formo de la plimulto da tekstoj frue kutimigas la lernantojn realigi simplan ĉiutagan konversaciadon.

Ĉiuj ĉi elementoj de la konstruo kaj enhavo de la lernolibro destinas ĝian fruktodonan uzadon. Ĝi prezentas tre bonan gvidilon eĉ por ne tre spertaj E-instruistoj. Kroma oportunaĵo por tiuj estas, ke ĝi estas dividita ne je lecionoj, kiel kutime, sed je malgrandaj paragrafoj, entute 132, kio ne limigas la kursgvindanton en la kadro de fiksita leciono, sed per-

mesas al li instrui kvanton da materialo laŭ sia plano. La gramatikaĵoj estas prezentitaj fine de la libro, kio ankaŭ donas eblecon al la instruisto instrui la gramatikon laŭ sia metodo.

Bedaŭrinde estas allasitaj iuj gravaj malperfektaĵoj, kiuj malaltigas ĝian kvaliton. En la tuta lernolibro estas sentata la dispozicio por gramatiko de la aŭtoro. Eĉ la titoloj de la paragrafoj estas gramatikaj. Li uzas eĉ sintaksajn terminojn, kiel subjekto, objekto, akuzativo de mezuro, objekta akuzativo, akuzativo de tempo ktp. Tio estas ekster la programo de unua grado, ĝi superŝargas la kurson kaj fortimigas la kursanojn. Eksterprogramaj estas ankaŭ iuj sufiksoj troviĝantaj en la lernolibro (-er, -ing, -op), la malsimplaj verboformoj. Ni instruas ilin en dua kaj tria gradoj. Laŭ la programo en unua grado oni instruas nur la formojn de la morfologiaj kategorioj. Des pli tio rilatas al la participoj, kies uzado estas tre komplika kaj estas instruata en dua kaj tria gradoj. Cetere, la aŭtoro mise klarigas la diferencon inter la aktivaj kaj la pasivaj participoj: subjekto—trinkanta; objekto—trinkata. Sed en lia ekzemplo „La lakto estas trinkata de la knabo“—trinkata rilatas al la gramatika subjekto.

Janev strebas doni ĉiujn nuancojn de la instruata elemento, kiujn li scias. Tio tute ne estas necesa en unua grado. Ĝi malfaciligas. Iuj paragrafoj estas superŝargitaj de novaj elementoj: \$29—sur, sub en, super: \$56—ist, ej, il. . .

Malgraŭ tiuj principaj mankoj (estas ankaŭ aliaj apartaj) la lernolibro de Neno Janev estas bona gvidilo por la kursgvindantoj. Eĉ ŝajnas al mi, ke ĝi estas la plej bona el la proponataj nun lernolibroj. Mi rekomendas ĝin al ĉiuj. Ni esperu, ke IEK (kiu estas komisiita disvastigadi librojn) pli ritme kaj akurate liveros ĝin al la bezonantoj.

Violin OLJANOV,
komisionestro pri instruado

Novaj gramofondiskoj

Honore al la 41-a kongreso de BEA aperis tri stereo-gramofondiskoj kun esperanta teksto, produktitaj de „Balkanton“, nome: Hristo Gorov—„Ribela Kordo“, poemoj (BAA 11481); Jana Cikalova—„Bulgara Rozo“ (BTA 11659); Veselin Damjanov—„Jubilea koncerto“ (BOA, 11569).

La gramofondisko „Ribela Kordo“ entenas 9 poeziaĵojn el la samnoma poemkolekto de Hristo Gorov, eldonita de Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1983. La kovrilo de la gramofondisko estas belaspekta—ĝi prezentas kolorbildon de la bulgara tero kaj ĉielo.

En Esperanto la poemojn deklamas nia eminenta artisto-esperantisto Mišo Zdravev. Li

bonege interpretas la tutan dramecon, per kiu estas penetritaj la versaĵoj. Aŭskultinte la poemojn „Post la fronto“, „Mia vilaĝo“, „Ribeluloj“, „Patrino atendas“, „La partizano Asparuh“, „Septembra balado“, oni klare sentas la etoson de la kontraŭfaŝisma ribelo en 1923 kaj de la batalo de la progresemaj popolamasoj dum la periodo 1941–1944.

Por la bona akceptado ankaŭ helpas la interesaj kaj emociaj muzik-aranĝoj.

La gramofondisko „Bulgara Rozo“ prezentas buntan bukedon el 15 estradaj, junularaj, infanaj kaj alispecaj kantoj de elstaraj bulgaraj komponistoj — Al. Rajčev, D. Petkov, Al. Josifov, G. Kostov, T. Rusev, G. Timev, At. Bojaĝiev kaj aliaj, laŭ tekstoj de L. Levčev, P. Matev, D. Metodiev, N. Vâlčev kaj aliaj. Estas enkluditaj ankaŭ du kantoj de la sovetaj komponistoj Aram Hačaturjan — „Pri kio revas la infanoj“ kaj „Valso de la amikeco“. Kiel aŭtoro de la dua kanto erare estas skribita la nomo de V. Muradeli anstataŭ tiu de A. Hačaturjan. „Valso de la amikeco“ estas tre populara kanto; ĝi estas premiita en 1951 ĉe la tutlanda konkurso en USSR. Ĝin oni ofte kantis dum la junularaj festivaloj.

Dezirinde estas, ke la kantistino Jana Cikalova, kiu posedas bonan voĉon, estu pli konvinka kaj la akompananta ensemblo estu pli preciza, ĉar estas momentoj, kiam ili ludas tre forte kaj oni ne bone povas aŭdi la voĉon de la kantistino, nek la kantatan tekston. Krom tio sur la kovrilo ne estas presitaj tekstoj de la kantoj, kio multe helpus la aŭskultantojn kompreni ilin.

La tria gramofondisko — „Veselin Damjanov — Jubilea koncerto“, estas dediĉita al la centjara jubileo de Esperanto (1887–1987).

Estas agrabla koincido, ke tiu koncerto estas „jubilea“ ankaŭ por la kantisto mem — Veselin Damjanov ĉi-jare estigis 60-jara. Tiu „jubilea“ gramofondisko posedas multajn kvalitojn: unue ni devas rimarkigi, ke la enkluditaj 7 popularaj operaj kaj operetaj arioj kaj 7 originalaj kantoj estas plenumitaj kun fajna lerteco kaj precizeco de „la plej fama kaj riĉa baritonvoĉo en Esperantujo“, kiel estas nomita de kanadanoj Veselin Damjanov. La kantado estas en mirinda sinkrono kun la piano-akompano de la pianistoj Georgi Stefanov kaj Evgeni Komarov.

En tiu koncerto Damjanov montriĝas kiel kantisto, tradukanto, poeto kaj komponisto.

La aŭskultanto povas ĝui la belegajn melodiojn kaj kompreni ĉion, ĉar la tekstoj de la arioj kaj kantoj estas presitaj sur la kovrilo. Tio estas plua avantaĝo de la gramofondisko.

Tiuj tri gramofondiskoj pliriĉigas nian esperantlingvan diskotekon kaj kontribuas al la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Dimităr TERZIEV,
ĥorestro, prezidanto de la Muzika
Esperanto-Ligo de UEA



El nia leterkesto

ESTONAJ AMIKOJ GASTIS ĈE NI

Dum la pasintjara veturado de nia artistaj grupo tra Sovetio, en Tallinn ni pasigis agrablajn horojn en la gastama domo de niaj estonaj amikoj Valdemar kaj Polina Kauts kune kun aliaj geesperantistoj. En intima esperantista etoso ni kvazaŭ ripetis la oficialan koncertan programon, tamen riĉigitan per amika babilado kaj kantado ĝis mateniĝo.

Ĉi-jare kun grupo da sovetaj turistoj Valdemar kaj Polina vizitis Bulgarijon kaj survoje al la Nigra Maro ili gastis al la redakcio de „Bulgara Esperantisto“. Dum tiu mallonga ĝoja renkontiĝo Valdemar dividis kun la redakciaĵoj interesajn pensojn kaj ideojn.

VALDEMAR KAUTS:

— Krom la turista, mi havas mian propran programon — renkontiĝi kun bulgaraj esperantistoj. La aktiva esperantisto ne povas agadi sen kontaktoj, sen interŝanĝo de sperto. En nia turista grupo neniu eĉ estis aŭdinta pri Esperanto kaj, vidinte miajn esperantaĵojn, oni petis min rakonti pri Esperanto. Ĉiuj mont-ris viglan interesiĝon kaj eble iuj el ili esperantistiĝos. En nia lando la E-movado plivigliĝas, novaj kluboj estas fondataj, al ni venas ĉiam pli da ĝejunuloj. En iuj lernejoj en Estonio oni jam instruas Esperanton kiel fakultativan lernobjekton. Novaj lernolibroj, vortaroj kaj belliteraturo estas eldonataj. Bedaŭrinde multaj veteranoj jam forpasis, iliaj parencoj ne ĉiam bone komprenas la valoron de ilia E-heredaĵo kaj tiukaŭze ĝi perdiĝas. Tion konsciinte, mi decidis aranĝi muzean kolekton pri Esperanto en mia vilaĝa domo proksime de Tallinn. Mi jam kolektas librojn, vortarojn, revuojn kaj ĵurnalojn, leterojn, manuskriptojn, personajn arkivojn de esperantistoj (ekzemple tiun de la estona veteranino Benita Käärt), fotojn, bildkartojn, E-poŝtmarkojn, insignojn, ktp. Mi turnas min al ĉiuj landaj kaj eksterlandaj amikoj helpi al mi, garantiante plej zorgeman konservadon de eventuale disponigitaj al mi esperantaĵoj, ĝis kiam mi povos transdoni ilin al oficiala landa muzeo de Esperanto. Mi esperas, ke tia muzeo estos fondita, kiam ni preparos konvenan por ĝi bazon. Per tiu mia aktivado mi deziras propagandi Esperanton kaj montri al la interesiĝintoj, ke ĝi estas forta ilo por kompreniĝo kaj paca kunlaborado inter homoj el diversaj landoj.

Fakte mia kolekto estas tre modesta kaj mi atendas la helpon de bondezirantoj. En Sofio mi jam renkontiĝis kun k-do Krăstju Karucin, kiu montris al mi la kolekton de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj donis al mi valorajn praktikajn konsilojn.

Se estos dezirantoj helpi tiun mian iniciaton, mi petas sendi siajn kontribuojn laŭ adreso:

USSR, 200026 — TALLINN, Str. Vilde 132—81, Valdemar Kauts.

Mi anticipe dankas tutkore ĉiun helpon kaj garantias konfirmon pri ricevitaĵoj.

AMIKA LETERO

En la Centra Estraro de BEA estis ricevita letero de Andrzej Pettyn, ĉefredaktoro de la Esperanto-redakcio ĉe Radio Polonia, kiu partoprenis la okazintan septembre j. k. en IEK — Pisanica, Internacian Simpozion pri Turismo. Ĉi-sube ni publikigas fragmentojn el tiu letero.

„... Mi devas konfesi, ke mi estas forte impresita de la dinamikeco de via ĉiuflanka agado, kiu tute klare celas starigon de solida bazo por la estonteco. Via BEA jam nun estas ekzemplo por multaj landaj organizaĵoj kiel oni povas bone kunligi la interesojn de la lando, en kiu oni vivas, kun tiuj de la esperantista movado. Mi ne havas dubon, ke agente por la patrolando la bulgaraj esperantistoj samtempe plejeble efike agas por vastigo de la internacia lingvo Esperanto, kiu — kiel montras la nuna stato de la bulgara movado — bonege servas kaj la popularigon de nuntempa Bulgario (en ĉiuj ties vivokampoj) kaj la kontribuon de la bulgaroj al la porpaca laboro.

Dum mia restado en Bulgario mi travojaĝis multajn regionojn de la lando, mi interparolis kun amaso da aktivuloj kaj mi venis rezulte de tio al la konkludo, ke en la nuntempa mondo, kiam la diverslandaj esperantistoj sufiĉe ofte perdas sian laboremon por Esperanto, ekzistas ŝtato, kiun oni nepre devas viziti por propaŭkule vidi, kion oni povas fari por Esperanto kaj por sekve reakiri la necesan entuziasmon. Tiu ŝtato estas Bulgario. Mi do ne dubas, ke estonte pli kaj pli multe da esperantistoj vizitos vian landon. Sed por ke ĉi tio efektiviĝu, necesas pli vasta ol ĝis nun informado pri la turismaj kaj aliaj aranĝoj por esperantistoj en Bulgario ne nur per la E-gazetoj. Mi firme kredas, ke ĉio tio sekvos i. a. en kunligo kun la Jubileo de Esperanto. Miaflanke mi certe kontribuos al tio per radio-elsendoj de RADIO POLONIA, ĉar via laboro vere indas tian popularigon.“

enlanda movado

KONFERENCO DE VETERANOJ-ESPERANTISTOJ

En urbo Săedinenie (distrikto de Plovdiv) okazis la raport-elekta konferenco de la Sekcio de Veteranoj-Esperantistoj.

Partoprenis pli ol 50 geesperantistoj-veteranoj el Sofio, Plovdiv kaj el aliaj loĝlokoj.

Raporton pri la agado de la Sekcio kaj pri la antaŭstarantaj taskoj faris Stojan Kostadinov. La reprezentanto de CE de BEA Draguško Petrov salutis la konferencanojn. Estis elektita nova estraro de la Sekcio.

La partoprenantoj en la konferenco vizitis la muzeon, la urbocentron kaj la novekonstruitan monumenton de la Unuiĝo.

D. P

EN STARA ZAGORA ONI AKTIVAS

● La 5-an de oktobro 1985 en la klubejo de Esperanto-societo „Verda Stelo“ okazis renkontiĝo de E-instruistoj kaj aktivuloj el la distrikto de Stara Zagora kun reprezentantoj de CE de BEA: la vicprezidanto Petăr Todorov, la ĉefsekretario Dimităr Papazov, la ĉefdirektoro de IEK Angel Todorov.

Dum la renkontiĝo oni pridiskutis la organizon kaj instru-agadon en la distrikto.

Al la sama temo estis dediĉita la plenkunsido de DE de BEA, kiu okazis la 6-an de oktobro.

Post la pridiskutoj la plenkunsido akceptis decidon organizi seminarion por kvalifikiĝo de E-aktivuloj el la distrikto. La seminario komenciĝos en oktobro per la prelego „La interlingvistiko — scienco eksperimenta“ de d-ro Stojan Guĝev.

La seminario daŭrigos sian laboron ĝis aprilo 1985 — ĝi okazos ĉiun duan dimanĉon de la monato.

Nejko ATANASOV

● En la Kuturdomo de Transportlaboristoj la 1-an de oktobro j. k. esperantistoj el societo „Fervojisto“ organizis solenan malfermon de E-kurso por komencantoj.

Ceestis multaj membroj de la societo, partoprenantoj en la kurso kaj gastoj, la E-veteranoj kaj membroj de la urba societo „Verda Stelo“ — Slavi Janulov kaj Rene Jordanova (operkantistino, Laŭreato de Dimitrov-premio).

Pri Esperanto kaj ĝia kreinto Zamenhof prelegis Todor Dimov.

La gastoj dankis pro la afabla invito kaj bondeziris al la novaj kursanoj sukcesan laboron. Fine Stefan Rusanov projekciis kolorajn bildojn el diversaj naciaj, internaciaj fervojistaj kaj UEA-kongresoj.

Stefan VELIKOV

GO-TURNIRO

Laŭ iniciato de N. Nejkov el urbo Dve Mogili — bulgara peranto de EGLI (Esperantista Go-Ligo Internacia) kaj dank' al la kunlaboro de la ĉefa esperantisto el Karlovy Vary Karel Stulz estis organizita la unua en Eŭropo koresponda Go-turniro. Laŭ informo de N. Nejkov, ĝin partoprenis sep geesperantistoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR kaj Sovetunio. Ĉiu ludas kontraŭ ĉiun, per du (por ĉiu paro) veturantaj „Go“-tabuloj.

Dum tiu turniro la partoprenantoj ne nur „go“-batalis, sed ankaŭ amikiĝis, pridiskutis problemojn de la E-movado. Tiel realigas praktike la slogano de EGLI: „Esperanto per Go! Go per Esperanto!“

N.R.

NIAJ PERANTOJ

Belgio. S-rino Yo Steyaert, Schotlandstraat 73, B-1060 Bruselo.

Britio. S-ro Paul Hewitt, Highfield Road, North Thoresby, Grimsby, South Humbertide DN 36 RT.

Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS-010 00 Praha 1.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Slovakia Esperanto-Asocio Sobotské námestie 6, CS-058 01 Poprad.

Jarabono — kiel supre.

Danlando. S-ro J. H. Eriksen, Torholmsvej 26, DK-9800 Hjørring; Poŝtkonto: 771.77 R.

Jarabono: 38 kr.

Federacia Respubliko Germanio. S-ro Roland H. Hegen, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein.

Jarabono: 8 DM

Finnlando: Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 Kuopio 10.

Jarabono: 24 fmk.

Francio. S-ro Gilbert Gerrier, Esperantista Federacio de Laboro, 179, rue Ordener, 75018 Paris; tel. 252.19.36

Jarabono: 20 ff.

Germana Demokratia Respubliko. Esperanto-Asocio, Centra Estraro, Charlottenstr. 60, 1080 Berlin.

Hispanio. S-ro Adonis Gonzalez Meana, str. Marcelino Gonzales, 5—4. D Gijon-9 (Austrias); tel. (985) 15 15 34.

Por leteroj kaj korespondadoj: Apartado 242 Gijon — Asturias.

Jarabono: 300 pesetoj.

Hungario. „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443, Budapeŝto.

Jarabono: 60 forintoj.

Japanio. S-ro Yoshiaki Mizuno, 327, Kitairiso, Sayama-sci, Saitamaken 350 — 13.

S-ro Nanba Syōzi, Hiruiti 3-13-26, Zuoto-ku, Osako 536.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Kubo. S-ro Pedro P. Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.

Luksemburgio. S-rino Germaine Hoffmann, 19, rue J. B. Esch, L-1473 Luksemburgio; tel. 44.49.34.

Malto. S-ro Anthony Mercieca, 20, Valletta Road, Qormi.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Pollando. S-ro Lech Kosiniak, str. Piekna 16 b/g PL-00539 Varsovio.

Portugalio. Portugal Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto, 6 R/C A, P-1500 Lisbono.

Jarabono: 260 eskudoj.

Sovet-Unio. Ĉefperanto Tutunia: Alar Kihun, str. Hiiu 5 — 5 SU-200016 Tallinn, Estonio.

Perantoj-helpantoj: Johannes Palu, USSR, SU-200016 Tallinn, Sólme 21; Abromas Laimundas, SU-234432, Jubarko raj., Pilis pŝt., Litovio.

Kulikov Vsevolod V., SU-644112, Omsk-112, ab, jaŝĉ. 1624.

Leo Medvedev, SU-129128 Moskvo, pr. Mira 196—44.

Usono. S-ro Roy Mc Coy, 371 Harvard Street Cambridge, Mass. 02138.

Jarabono: 5 us. dol.

Vjetnamio! Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107, Quan Thanh, Hanoi. S-rino Vũ Thanh Huong, 20 Ly Thai To Vie.

Vien Ngon ndú hos, Hanoi.

ENHAVO

Paĝo

*** Historiaj decidoj por savo de la homaro . . .	II
ĤRISTO GOROV — Laŭplana semado — riĉa rikolto . . .	1
*** Bulgario kaj UN . . .	2
Prof. HUMPHREY TONKIN — La Internacia Lingvo kaj Unuigintaj Nacioj . . .	3
TIBOR SEKELJ pri Esperanto en la XXIII Sesio de UNESKO . . .	5
RADI BANĈEVSKI — La Unua ILEF-festivalo . . .	7
DIMITAR ATANACOV — Tria Kooperativa Konferenco . . .	9
PARASKEVA ĈOLAKOVA — Kvina IMEK en Schwerin . . .	10
VLADIMIR JELEV — XIV foira renkontigo . . .	11
FRTZ WOLLENBERG — La humanisma mcsaĝo de Zamenhof . . .	11
LJUBOMIR MIĤAJLOV — Premiita poeziaĵo . . .	12
Ni recenzas . . .	14
Poezia paĝo . . .	IV

Sur la unua kovrilpaĝo:

Biljana GJAUROVA, 12-jara lernantino en VI klaso de baza lernejo „Otec Paisij“ en Ruse estas bonega lernantino kaj aktivulino de la junpionira organizaĵo.

Biljana estis la plej juna membro de la Esperanta Amatora Teatro ĉe la Distrikta Estraro de BEA en Ruse. Ŝi ĝuas varman akcepton fare de la publiko pro sia bonega deklamado de E-poeziaĵoj. La lasta sinprezento ĉe Biljana estis antaŭ internacia publiko, dum la okazinta fine de septembro j. k., en Plovdiv III Internacia Kooperativa E-Konferenco.

Biljana estas filino de d-ro Stefan Gjaurov, E-instruanto kaj aktivulo en Ruse.

POPOLFABELOJ SERĈATAJ

La esperantista junulargrupeto en Leipzig (GDR) alvokas ĉiujn esperantistojn traduki popolajn fabelojn kaj ilin sendi al Kulturbund der GDR, Bezirksleitung Leipzig, Jugendgruppe Esperanto GDR — 7010 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115.

Viajn tradukaĵojn ni uzos por pliriĉigi niajn aranĝojn. Kelkajn el ili ni aperigos en „Saksa Kuriero“ kaj multajn ni premios per jarabono de tiu ĉi leginda esperantlingva ĵurnaleto. Bonvolu skribi. Respondon ni garantias.

KOREKTO

En n-ro 8/1985 de „Bulgara Esperantisto“ sur paĝo 8, sub la rubriko „Niaj E-veteranoj“, en la gratulartikolo okaze de la 80-jariĝo de prof. MIĤAIL D. POPOV la redakcio allasis gravan kaj tre malagrablan eraron: la portreto ne estas de prof. M. Popov, sed de la E-veterano STEFAN GANEV POPOV el Ruse, pri kies forpaso ni informas sur paĝo III.

La redakcio petas pardonon de prof. Mihail D. Popov kaj de la parencoj de Stefan G. Popov.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĀCEV, Vasil BOROVANSKI, Radoslav DOJCINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitar ĤAĈIEV, Krĉstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado, Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario P. K. 66
tel. 31-70-19 1 000 Sofio
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117



Lige kun la 90-a datreveno de naskiĝo (1985) de Dolores Ibarruri (La Passionaria), eminenta agantino de la hispana kaj la internacia laborista movado, ni donas ĉi-sube lokon al la versaĵo de Debora Vaarandi „Dolores Ibarruri“, kiun tradukis el la estona lingvo nia samideano J. Ojalo.

Dolores Ibarruri ludis gravan rolon en la milito de la hispana popolo kontraŭ la faŝistaj puĉistoj kaj intervenintoj (1936—1939). Dum la Dua Mondmilito (1939—1945) ŝi aktive batalis por unueca nacia fronto, kontraŭ la altiĝo de Hispanio en la militon je la flanko de faŝista Germanio, partoprenis la internacian kontraŭfaŝisman movadon. Post la milito, kiel ĝenerala sekretario de la Hispana Komunista Partio, ŝi laboris por likvido de la Franco-diktaturo, por nacia sendependeco kaj demokratiigo de Hispanio.

Dolores Ibarruri estas aŭtoro de multaj publicistaj artikoloj kaj de kelkaj libroj.

Estante unu el la fondintoj de la Internacia Demokratia Federacio de Virinoj (1945), Ibarruri aktive partoprenis la internacian demokratian virinan movadon.

Debora VAARANDI

DOLORES IBARRURI

En ĉi somer' — memoras ni—
streĉita estis atmosfero.

De l' Nigra kontinento pri
milit' haladzis la aero.

Ekflagris, jen, subite Hispanio,
hejmlando via,
Passionaria.

Dolores Ibarruri!

Ne nomo ĝi, sed voko al batal'!

Penetris ĝi en milojn, milojn, korojn,
fariĝis por batalo la signal':
defendu liberecon kaj honoron!

Ĝa estas en la tero hispania
karegaj tomboj al hejmlando nia,
Passionaria.

Nin ligis granda sangoamikec'.

Kun flama nom' sur lipoj miloj juris
defendi vin ĝis mort', ho liberec'!

Ĉe Stalingrado ankaŭ Ruben Ruiz Ibarruri —
la juna militist' el Hispanio,
solfilo via,
Passionaria.

Dolores!

La nomo doloriga. Persvade
instigas penson ĝi konstante:
se surgenue devus ni vivadi —
prefere mortu ni starante!
Surgenuiĝis nek l' popolo hispania
nek vi,
Passionaria!

Honestaj koroj kun popolo via,
kun vi, Eterne kunliganta
la ruĝa flag', Passionaria,
la vicojn de l'libero-batalantoj.
Neniam ja forgesos Hispanion
komuna la parti',
Dolores Ibarruri.

El la estona
lingvo: J. OJALO

CARMAJ RODOPOJ

Jes, certe, belaj, pacaj, ĉarmaj Rodopaj Montoj,
kie la mond' ankoraŭ Naturo pura estas;
kie la vivo sekvas la fluon sen trakuro
de tiuj neŝangeblaj praleĝoj de la Tero:
vintro, printemp', somero... La flaviĝinta aŭtuno,
la ruĝiĝinta aŭtuno foliliberiganta!
La suna, milda aŭtuno, kiu metamorfozas
je mil diversaj tonoj la verdon de l' arbaro,
dum la folioj flugas kvazaŭ sencelaj birdoj
tra la vento, fuĝantaj en felica frenezo...
Oh, dolĉeco de l' mondo, melankolia ĝojo,
nepriskribebla ĉarmo de l'arbar' silenta:
la profundaj, misteraj deklivoj ĝis la valoj,
ĉe kies fund' obskura murmuris rivereto;
la krakanta tapiŝo de seka foliaro
kie aŭdiĝas „pura“ la voĉo de l'silentol'...
La pinarboj majestaj, kie zumas la brizo,

la betul' eleganta, kie l' acr' babilas,
la ruĝaj ĉerizujoj, la orecaj pomarboj,
la sona foliaro de la kvarkoj...
Simfonio mildtona de la Naturo sola,
kiu eniras funde ĉe l'anim' kaj scito!...
Kaj tiuj silutoj krutaj de l'altaj pintoj,
kie montriĝas l'akra ostaro de la Tero;
la vastaj panoramoj de l'horizonto llua,
de sinsekvaj montĉenoj
kaj la melarkoliaj trutaroj paŝigitaj
en la verdaj paŝtejoj...
Jes, certe, belaj, pacaj, ĉarmaj Rodopaj Montoj:
ĉe vi ankoraŭ restas beleco kaj mistero
kaj ĉe la funda fundo de animomia
por ĉiam, jam por ĉiam
via memoro restos.

Pisanica, 11-a de oktobro 1985

José F. ARROYO